IPR

Driemaandelijks tijdschrift
Afgiftekantoor: Antwerpen X. ISSN 1013-2031
Jarkolekto 52 - trimonata
2022/1

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:
József Németh (red.)
Mireille Grosjean
Luigia Oberrauch Madella
Ahmad Reza Mamduhi
Rob Moerbeek

Kunlaborantoj de la aktuala numero:
Javier Alcalde
Hans E. Becklin
Mireille Grosjean
Kimura Goro Christoph
Zsófia Kóródy
Stefan MacGill
Alessandra Madella
Larysa Osadchuk
Svetlana Pogorelaja
Ahmad Reza Mamduhi
Bardhyl Selimi



ilei

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

ENHAVO

Enkonduko (Ahmad Reza MAMDUHI) 3
KIMURA Goro: *Konsciigo pri interlingva komunikado en universitato* 4
Alessandra MADELLA: *ILEI dum la 41-a Sesio* […] *de UNESKO!* 6
Alessandra MADELLA: *La projekto* 30 Oraj Horoj *de ILEI kadre de* […] . 11
Larysa OSADCHUK: *Kiel atentigi pri Esperanto per origamio* 14
Mireille GROSJEAN: *Pri distanco, sed ne pri viruso / Kapsulo* 19
Mireille GROSJEAN: *Nova eldono de lernolibro de Eo en la svahila* 21
Javier ALCALDE: *Esperanto kaj sociaj sciencoj (II.)* 22
El la landoj kaj sekcioj (AL, FR, DE, IT, UA) 25
Kvin temoj por 2022 (Stefan MACGILL) 29
Hans E. BECKLIN: *Gobbo, Federico. Amikaro* (recenzo) 31
Informoj pri ILEI, redakciaj informoj 36
Adresaro de funkciuloj de ILEI 38

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Ahmad Reza MAMDUHI, Nr. 9, K. Iraj, Kh. Dowlatshad Gharbi, Kh. Farid-Afshar, Kh.Vahid Dastgerdi, Tehran-1916613514, Irano. Tel. +98 9122115419 (Telegram, WhatsApp). <*mamduhi@gmail.com*>. Universitata agado, ekstera komunikado kaj varbado, observanto kaj komitatano A ĉe UEA.

Sekretario: Elena NADIKOVA, ul. Kadikova, 24-41, RU-428037 Ĉeboksari, Rusio, Tel. +7 919-670-25-34. <*lena_espero@mail.ru*>. Lerneja agado.

Estrarano pri financoj: Karine ARAKELJAN, 33 Khandjian Str., Apt. 4, AM-0010 Erevan, Armenio. *ilei.kasisto@gmail.com* (financoj). Tel.+374 55 279906 (Viber, WhatsApp), <*karinko_arm@mail.ru*>. Ekzamenoj.

Vic-prezidanto: Alessandra MADELLA, via Prampolini 8 43122 Parma, Italio, Tel. +39 0521 785582, <*a.madella@tiscali.it*>. Lerneja, universitata, scienca, landa kaj regiona agadoj (Orienta Azio), ekstera komunikado kaj varbado.

Estrarano pri kongresoj: Laura BRAZZABENI, via San Filippo 52, 58031 Arcidosso (GR), Italio. <*laura.brazzabeni@gmail.com*>. Tel. +39 3286461063 (WhatsApp). Lerneja agado.

Estrarano: Marija JERKOVIĆ, Jarunska 6, 10000 Zagreb, Kroatio. Tel. +385 981771741. <*mjerkovic@net.hr*>. Lerneja kaj landa agadoj.

Estrarano: Fernando PITA, Estr. Cel. Vieira 134, bl 3, ap 402; Irajá; Rio-de-Ĵanejro cep 21220-310, Brazilo. <*magisterpita@gmail.com*>. Tel. +55 21 98863-3854 (Telegram,WhatsApp). IPR, universitata kaj scienca agadoj, observanto ĉe TEJO.

Estrarano: Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. <*radojica.petrovic.rs@gmail.com*>. Tel. +381 64 8525321 (Viber, WhatsApp, Telegram). Eduk-projektoj, universitata agado, instrukapabligado.

Scienca Komitato

***Prezidanto*: Humphrey Tonkin**, Usono, University of Hartford; AdE[1]

***Membroj*:**

Duncan Charters, Usono, Principia College, Elsah

Renato Corsetti, Britio/Italio, Università degli Studi di Roma „La Sapienza"; AdE[1]

Probal Dasgupta, Barato, emerita profesoro de LRU, Indian Statistical Institute, Kolkata; AdE[1]

Aloyzas Gudavičius, Litovio, Šiaulių universitetas

Boris Kolker, Usono; AdE[1]

Ilona Koutny, Pollando/ Hungario, Uniwersytet im. Adama Mickiewicza w Poznaniu

Stefan MacGill, Nov-Zelando/ Hungario

Aleksandr Melnikov, Rusio, Академия Сельскохозяйственного Машиностроения, AdE[1]

Radojica Petrović, Serbio, Univerzitet u Kragujevcu

Balázs Wacha, Hungario, MTA Nyelvtudományi Intézet

[1] AdE – Akademio de Esperanto

Sur la titolpaĝo: La broŝuro por la projekto 30 Oraj Horoj ĉe UNESCO (vd. p.6)

Sur la dorskovrilo: afiŝo de *Juna Amiko*

Enkonduko

Karaj legantoj,

Mi tre ĝojas, ke bonaj kontribuoj en IPR instigas ankaŭ aliajn kompetentulojn ekverki por IPR samterene pliriĉigante la temon. Ekz-e en la antaŭa numero aperis artikolo de Javier Alcalde, kiu montris al ni tre efikajn kaj allogajn vojojn por enkonduki Esperanton en diversajn studobjektojn. Tio feliĉe instigis KIMURA Goro Christoph raporti pri sia unusemestra „kurso en sociscienca fakultato, en kiu Esperanto ludas rolon." Tie li aludante al antaŭaj aprezindaj ekzemploj de Vicente Manzano-Arrondo (Viko) kaj Ilona Koutny, „volas montri, ke eĉ se en multe pli modesta skalo, eblas utiligi E-on en universitata edukado".

Sufiĉas ĝui nur fascinan rezulton, kiun havis lia kurso por la studentoj fine de la semestro ilia-vorte, ekz-e: „Antaŭe mi pensis, ke per la angla eblas pli bone informiĝi pri la tuta mondo. Sed mi konsciiĝis pri la privilegia pozicio de anglalingvaj regionoj kaj personoj por disvastigi siajn vidpunktojn. Por vere mem kompreni la mondon, necesas informoj el diversaj lingvoj."

La titolo de lia verko, kiu estas la bazo por lia kurso, montras al mi, ke probable kiel Robert Phillipson verkus, se li estus orienta, azia aŭ japana klerulo: „Rekomendinde estas ŝpareme uzi la anglan lingvon: liberiĝo de la dependiĝo de la angla estas ŝlosilo por alfronti internaciiĝon kaj tutmondiĝon" (Yorozu Shobo 2016, 283 p.). Mi esperas ke lia verko ne restos en sia originala lingvo, kiel ĉefverkoj de Phillipson ĉi-terene.

Ahmad Reza MAMDUHI

Konsciigo pri interlingva komunikado en universitato

de KIMURA Goro Christoph (Japanio)

En IPR 20/1 artikolis Javier Alcalde pri Esperanto kaj sociaj sciencoj. Tiu artikolo instigis min raporti pri universitata kurso en sociscienca fakultato, en kiu Esperanto ludas rolon. Rilate al la temo Esperanto en universitatoj ne mankas elstaraj kaj brilaj ekzemploj, kiel la projekto prezentita de Vicente Manzano-Arrondo (Viko) en IPR 20/3, en kiu Esperanto estas praktike utiligata, aŭ la Interlingvistikaj Studoj en Poznano, longjare organizataj de Ilona Koutny, kiu donas eblon altnivele okupiĝi pri Esperanto science (vidu plej lastan raporton en IPR 21/4). Ĉi-raporte mi volas montri, ke eĉ se en multe pli modesta skalo, eblas utiligi Esperanton en universitata edukado.

Ĝenerala priskribo de la kurso

La kurso, kiun mi prezentas ĉi tie, momiĝas „lingvaj dinamikoj" kaj estas elektebla kurso por studentoj de la fakultato por politikmanaĝado de Keio-universitato apud Tokio. En tiu kurso, Esperanto surface nur parte aperas, kiel unu el la lingvoj rekomendataj lerni, sed fakte la tuta kurso baziĝas sur esperantisma problemkonscio. Jen parto de la priskribo de la prelego (originale japanlingva):

Pri la angla kiel internacia lingvo unuflanke ekzistas pozitivaj voĉoj, ke ĝi bone funkcias kiel „tutmonda komuna lingvo", aliflanke estas kritikoj pri „lingva imperiismo". Pri aliaj lingvoj ekzistas diversaj opinioj: Iuj diras, ke en la hodiaŭa mondo necesas lerni almenaŭ du fremdajn lingvojn, aliaj pensas, ke la angla sufiĉas kaj lernado de aliaj lingvoj ne plu estas bezona. En tiu ĉi kurso ni pripensu surbaze de la reala socilingvistika stato de la mondo pri ebloj kaj limoj de diversaj rimedoj de interlingva komunikado.

Enhavo de la kurso

La kurso, kiu daŭras unu semestron, uzas kiel bazon mian libron *Setuei no susume. Datueigoizon koso kokusaika, gurobaruka taiou no kagi!* [Rekomendo ŝpareme uzi la anglan lingvon: liberiĝo de la dependiĝo de la angla estas ŝlosilo por alfronti internaciiĝon kaj tutmondiĝon], Yorozu Shobo 2016, 283 p. Laŭ metodo de „inversa instruado", ĉiusemajne la studentoj prepare legas unu ĉapitron de la libro kaj skribas resumon en propraj vortoj kaj komentojn/demandojn. Leginte tiujn hejmtaskojn, en la prelego mi respondas al la demandoj kaj aldonas klarigojn. Se restas

demandoj aŭ neklarecoj, la studentoj povas demandi. Ĉiujare partoprenas inter 100 kaj 200 studentoj. Mi spertis, ke legi la komentojn ĉiusemajne estas pene, sed ke tiu mensa ekzerco de dialogo kun studentoj malfermas novajn perspektivojn ankaŭ por miaj esploroj.

En la unua duono de la semestro temas pri nuntempaj problemoj de internacia kaj interlingva komunikado. Konkrete ni diskutas pri tio, ke la internacia uzo de la angla unuflanke ebligas vastan komunikadon tra la mondo, sed aliflanke kreas hierarkion laŭ lingvokapablo kaj plifortigas neekvilibran informfluon. En lastaj jaroj mi ankaŭ mencias la signifon de lingvo por atingi la Celojn por Daŭripova Evoluigo proklamitaj de Unuiĝintaj Nacioj. La celo estas, ke studentoj komprenu, ke negativaj flankoj de la internacia uzo de la angla estas same veraj kaj gravaj kiel la pozitivaj flankoj. Simple por montrado de faktoj, la studentoj pli kaj pli konsciiĝas pri tio, kiel iliaj komentoj montras. Nek necesas nek utilas riproĉi la mondanglan kiel malbonon.

En la posta duono de la semestro ni fokusas la atenton al ebloj por plibonigi la interlingvan komunikadon. La ĉefaj temoj pritraktataj estas la konceptoj de la „angla kiel lingvafrankao" (*English as a Lingua Franca*), „mult- kaj plurlingvismo" kaj „facila japana lingvo". La unua koncepto volas apartigi la internacie uzatan anglan disde la angla kiel gepatra lingvo. Iusence esperantigo de la angla. Kadre de la dua diskuttemo pri lerno kaj uzo de diversaj lingvoj mi prezentas Esperanton kiel vere uzatan internacian lingvon. Mi nek varbas nek propagandas por Esperanto, sed prezentas ĝian idean fonon kaj praktikan utilecon, aldonante proprajn spertojn. La tria temo estas nun en Japanujo populariĝanta ideo adapti la uzon de la japana lingvo al la lingvokapabloj de lernantoj de la japana. La celo de tiu posta duonparto de la kurso estas, ke studentoj komprenu la avantaĝojn kaj limojn de diversaj proponoj por pli justa kaj efika interlingva komunikado.

La reago de studentoj estas tre interesaj. Komence multaj estas skeptikaj pri la ideo "ŝpareme uzi la anglan lingvon" kaj ne dependi de la angla je internacia komunikado. Antaŭe ili neniam aŭdis pri problemaj flankoj de la angla kiel komuna lingvo. En lernejo oni fakte prezentas la anglan – en preskaŭ ĉiuj lernejoj en Japanujo la sola fremdlingvo lernebla – nur kiel utilan komunikilon. Sekve, multaj (ne nur) junuloj havas idealigitan bildon de la angla (eble simile al idealigita bildo, kiun ofte esperantistoj havas pri sia planlingvo). Do, realisma aliro al la internacia komunikado estas okulfrapa por multaj. Mi prezentu du ekzemplojn de komentoj de studentoj fine de la semestro.

Per tiu ĉi kurso la nocio „mondo” por mi ege ŝanĝiĝis. Antaŭe mi spertis, ke mi povas per la angla komunikiĝi kun multaj homoj el diversaj landoj. El tiuj spertoj mi sentis la utilecon kaj fortecon de la angla kaj pensis, ke la mondo estas fakte malvasta. Sed mi rimarkis, ke mi eraris, kaj ke la mondo estas multe pli vasta.

Antaŭe mi pensis, ke per la angla eblas pli bone informiĝi pri la tuta mondo. Sed mi konsciiĝis pri la privilegia pozicio de anglalingvaj regionoj kaj personoj por disvastigi siajn vidpunktojn. Por vere mem kompreni la mondon, necesas informoj el diversaj lingvoj. Tiun fakton mi volas diskonigi ankaŭ al aliaj. Kaj mi mem volis agi tiudirekte kaj eklernis la ĉinan.

Simile rakontas ankaŭ aliaj studentoj, ke ili eklernis aŭ almenaŭ decidis eklerni alian lingvon ol la anglan. Kelkaj ankaŭ memstare eklernis Esperanton.

Laŭ mi gravas, ke tiu ĉi kurso okazas en sociscienca fakultato, ĉar konsciiĝo pri la lingva dimensio de la socio kaj la mondo estas esenca, sed ofte neglektita aspekto en sociaj sciencoj. Sed certe tia konsciiĝo gravas ankaŭ por studentoj de aliaj fakoj. Surbaze de plurjaraj spertoj en la Keio-universitato, ekde aŭtuno 2022 mi faros similan kurson ankaŭ en la Sophia-universitato en Tokio kiel elektebla kurso por studentoj de ĉiuj fakultatoj.



KIMURA Goro Christoph estas profesoro ĉe la Sophia-universitato kaj instruas/instruis ankaŭ en kelkaj aliaj universitatoj en kaj ĉirkaŭ Tokio pri socilingvistikaj kaj lingvosociologiaj temoj.

ILEI dum la 41-a Sesio de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO

de Alessandra MADELLA (Italio)

Ĉi-jare (2021) ni timis, ke Ne-Registaraj Organizoj (NRO) kun ne-oficialaj rilatoj kun UNESKO ne estos invitataj partopreni en la 41-a Sesio de la Ĝenerala Konferenco. Fakte, por la grava evento, okazonta inter la 9-a kaj la 24-a de novembro 2021 en Parizo, oni antaŭvidis pli striktajn regulojn pro la kronvirusa situacio. Temis ja pri la 75-a datreveno de la institucio, kun

multe da gravaj gastoj kaj la samtempa neceso iel limigi ĉeestan partoprenon. ILEI estas en tiu grupo de NRO-oj, kiuj povas sendi observantojn al UNESKO, sed ne delegitojn, ĉar ĝi nuntempe ne havas oficialajn rilatojn kun UNESKO. Ĝi havis ilin, sed perdis ilin pro burokratismaj kaŭzoj kaj estas klopodanta reakiri ilin ekde 2016, kiam Mirejo Grosjean, la tiama ILEI-prezidanto, prezentis peton ĉi-rilate. Tamen, ĝuste por helpi tiun reakiran procezon, gravas, ke ILEI klopodu regule sendi siajn reprezentantojn al la konferencoj de UNESKO. En la pasintaj jaroj, tion ĝi ĉiam sukcese faris, danke al la streboj de la franca sekcio sub la gvido de la tre aktiva Monique Arnaud. Ĉi-fojon, tamen, pro la kronviruso kaj la tiel neoportunaj personaj situacioj de la plejmulto de la francaj ILEI-membroj, oni fine decidis escepte sendi reprezentantojn el aliaj landoj: Maksimiliano Garcia el Katalunio kaj min mem el Italio. Monique, Mirejo kaj François Lo Jacomo (kiu tre kompetente gvidis la 5-membran delegacion de UEA) multe helpis nin plenumi ĝustatempe la burokratismajn formalaĵojn kaj plani la detalojn de nia vojaĝo, ĝis ni estis fin-akceptitaj kiel observantoj fare de UNESKO. Mi restis en Parizo dum la unuaj kvar tagoj de la konferenco, gastigata de afabla samideanino Anita Muñoz. Max restis tie dum preskaŭ la tuta tempo de la konferenco. Ankaŭ dum nia restado la konsiloj de Monique kaj Mirejo kaj la daŭra amika subteno de la tuta delegacio de UEA estis fundamentaj por la efika rezulto de nia laboro.



Ni ambaŭ volis prezenti ne nur ILEI kaj Esperanton ĝenerale, sed ankaŭ du projektojn, kiujn ILEI kaj UEA kandidatigis por la premio Hamdan de UNESKO: la ekologian animacian projekton „Ni savu la planedon kun Kungfua Kunikleto!" de Miguel Herberg kaj la instruan projekton en italaj superaj mez-lernejoj „30 Oraj Horoj". Por fari tion, ĉar por ni ambaŭ temis pri la unua fojo ĉe UNESKO, ni unue klopodis precipe lerni ĝenerale kiel moviĝi en la nova etoso. La unua paŝo estis bone aŭskulti, por vidi kiel ni povus pli bone retorike prezenti nian mesaĝon pri la graveco de lingvaj problemoj al tiu internacia kaj ofte poliglota publiko. Ni atente sekvis la salutojn de la estroj, ministroj kaj ambasadoroj de la diversaj ŝtatoj en la ĉefa salono, notante iliajn lingvajn elektojn. Kiel Renée Triolle bone resumis la situacion, eĉ la landoj de la iama komumisma bloko en Orienta Eŭropo, kiuj en la pasinteco preferis la francan, ĉi-fojon plejmulte uzis la anglan. Tamen, arabaj ŝtatoj preskaŭ ĉiam elektis la araban kaj la reprezentanto de Irlando akiris rimarkindan retorikan efikon, ĉar li komencis sian alparolon en la franca.

Same gravis atenti pri la temoj. Depende de la mondaj regionoj, daŭripova evoluo, la samaj rajtoj por virinoj kaj GLAT, la subteno al Afriko, la etiko de Artefarita Inteligento, la superado de la cifereca divido, la helpo al junuloj kaj la neceso bone pretigi la post-pandemian periodon estis inter la plej gravaj. La pandemio fakte akrigis multajn el tiuj problemoj tra la mondo, same kiel klasajn dividojn. Iuj ŝtatoj kiel Estonio atentigis ankaŭ pri la danĝera forfalo de indiĝenaj lingvoj, dum aliaj kiel Ebur-Bordo substrekis la gravecon de dulingva edukado por divers-etnaj komunumoj.

Jam en la pasintaj jaroj la reprezentantoj de UEA kaj ILEI sindediĉe teksis paciencajn rilatojn kun reprezentantoj de landoj kaj NRO-oj atentemaj pri lingvaj problemoj. Ankaŭ niaj projektoj de la Kungfua Kunikleto kaj de la „30 Oraj Horoj" ĝuis do la helpon de jam ekzistanta reto de simpatio pri Esperanto kaj ĝia lingva politiko de protektado de malpli potencaj lingvoj, lerte prezentita dum la jaroj.

Alia grava parto de nia laboro estis malstreĉe kaj afable alparoli homojn en koridoroj, en kafo-vicoj kaj dum la manĝoj. Oni avertis nin, ke temas eble pri la plej grava komponanto de la tuto, ĉar tiuj estas la lokoj kaj okazoj, kie la vere gravaj negocoj estas farataj kaj intereso por iu afero povas esti spontane gajnata, ekster formalaj ceremonioj. Oni tie ofte ricevas ankaŭ la plej valorajn informojn. Tio okazis ankaŭ al Max kaj mi. Fakte, parolante entute almenaŭ 9 lingvojn, ni multe ĝuis tiun parton de nia laboro. Simpatia membro de la delegacio de Ganao, kiu manĝis kun ni sian sandviĉon en

ĝardeneto, ekdemandis al ni pri Esperanto. Ni montris al li folion pri la animacio „La aventuroj de Saĝa Steleto” kaj petis lian personan konsilon, kiel doni pli da videblo al niaj projektoj ene de UNESKO. Li do sendis nin al pli malgranda salono, kie tamen devis baldaŭ eki la Monda Konferenco pri Edukado.

Unu horon poste en la saman salonon eniris la Ĝenerala Direktorino de UNESKO Audrey Azuley kun la Prezidanto de la Franca Respubliko Emmanuel Macron.

Fakte, Francio metis multe da politika pezo sur la „Deklaracio de Parizo”, vidata kiel nova socia kontrakto por edukado. Temis pri la kreado de internacia reto por subteni viv-daŭran edukadon ankaŭ en la plej malriĉaj landoj, pere de interalie pli justa taksado de multnaciaj korporacioj laŭ vojoj jam parte teoriigitaj fare de la franca ekonomikisto Thomas Piketty. Dum la pandemio 116 milionoj da gestudentoj ne povis frekventi lernejojn, plejmulte en la plej malriĉaj landoj kaj ofte inaj, malplimultaj kaj diasporaj studentoj. Samtempe instruistoj spertis pli malfacilajn kaj necertajn laborkondiĉojn, en kiuj ili estis tro laborigitaj kaj subtaksitaj. Do, investi en ili kaj en ilia edukado iĝas eĉ pli grave. Stefania Giannini, Vic-direktorino de UNESKO kun delego pri edukado, substrekis ankaŭ, ke edukado pri ekologio kaj genra egaleco devas same iĝi centra. Tio ĉi estas la kunteksto, en kiu Max Garcia povis fari sian 3-minutan alparolon nome de ILEI, kiu altiris multe da atento pri Esperanto.



Max Garcia kaj François Lo Jacomo
kun la direktorino de UNESKO, Audrey Azoulay

Ni vere ne sciis, ke ni rajtas publike paroli. Ni pensis, ke nur kiel observantoj de NRO sen oficialaj rilatoj kun UNESKO ni verŝajne ne rajtas tion fari. La tuta atento en nia Esperanta cirklo estis do pri la oficiala alparolo de François Lo Jacomo nome de UEA en la unua salono, kiu estis pretigita kun longaj diskutoj, klere polurita kaj fine tre elegante prezentita. Sed Max kaj mi hazarde aŭdis frazon de la Prezidantino de la Asembleo pri Edukado, kiu bonvenigis komentojn ne nur de ŝtatoj, sed ankaŭ de NRO-oj pri la teksto de la „Deklaracio de Parizo". Do, tuj demandante sinsekve al tri respondeculoj, ni sukcesis vere obteni la permeson paroli.



La tuta alparolo de Max estas spektebla en la jutuba kanalo de ILEI (https://www.youtube.com/watch?v=5QomYe6LR28&t=79s). Ĝi ne nur turnigis kapojn parolante pri la teknike altvalora projekto de la Kungfua Kunikleto, sed ĝi adoptis la retorike ruzan movon praktike pensigi pri la problemoj kaj kostoj de tradukado kaj interpretado en internaciaj kongresoj mem uzante kvar lingvojn. Ne estis malfacile vidi, ke Esperanto estus taŭga kaj akceptebla solvo al tiu problemo. Kaj la stilo estis tiel glata kaj evidenta, ke eĉ la prezidantino de la asembleo fine ridetis. Pro tio multe da delegacioj memoris pri la lingvo de Zamenhof en la sekvaj tagoj.

En la postaj semajnoj certe multe pli da laboro estis farita, danke al la komunaj senĉesaj streboj de Max kaj de la reprezentantoj de UEA, kiuj daŭre restis tie en Parizo. Max eĉ sukcesis mallonge persone paroli kun Audrey Azulay kaj Stefania Giannini. Sed mi persone pensas, ke nia plej granda

kontribuo kiel reprezentantoj de ILEI ĉi-foje eble estis vere tiu mallonga publika alparolo, kiu lasis al ILEI ankaŭ lokon en la finaj protokoloj de la asembleo kiel unu el la nur 2 reprezentantoj de civila socio, kiuj donis sian opinion en tiu debato pri grava interkonsento inter ŝtatoj. Humphrey Tonkin rememorigas al ni, ke grandaj organizaĵoj kiel UNESKO kaj UN nun pli kaj pli interesiĝas pri tio, kion la membroj de la civila socio volas. Do, paroli en similaj okazoj estas certe unu el la ĉefaj vojoj, per kiuj ni povas esti aŭskultataj kaj aprezataj kiel esperantistoj kun nia aparta vido pri mondaj problemoj kaj iliaj eblaj komunaj solvoj. Espereble ankaŭ la venontaj reprezentantoj de ILEI ĉe UNESKO povos daŭre progresi en tiu ĉi direkto.

La projekto „30 Oraj Horoj" de ILEI prezentita kadre de VERDEN

de Alessandra Madella (Italio)

En la tagoj 20-a, 21-a kaj 22-a de novembro 2021 okazis en la urbo Parmo de norda Italio la unua ĉeesta kunveno de la projekto VERDEN. Kiel la samtempe Esperantema kaj ekologiema nomo bone montras, temas pri projekto, financata de la programo Erasmus+ de Eŭropa Unio, por kune pripensi novajn formojn de daŭripovaj evoluo kaj transporto pere de la Internacia Lingvo. La eŭropaj partneroj, sub la kunordigado de UEA, estas IFEF, Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (precipe la sekcioj de Ĉeĥio kaj Francio), BEMI (Biciklista Esperantista Movado Internacia), FEL (Flandra Esperanto-Ligo) kaj Esperanto-Asocio de Parmo, membro de Itala Esperanto-Federacio. La sekvaj renkontiĝoj de la projekto okazos ĉe Kastelo Grezijono en Francio, en Pardubice en Ĉeĥio, Roterdamo en Nederlando, Loveno en Belgio kaj fine en julio 2023 dum la UK de Torino en Italio. Tiam estos prezentataj la projektaj rezultoj ankaŭ en libra formo. Tio estas la unua ekzemplo de 3-jara projekto de UEA financata de Eŭropa Unio. Pro tio kaj pro la fakto, ke ĝi

celas proponi novigajn rezultojn por pli larĝa socio, ĝi meritas la nomon de „pilota projekto”, kiun la prezidantino de IFEF, Rodica Todor, donis al ĝi.

Tritagaj diskutadoj inter estraranoj de la asocioj okazis en la klasĉambreto de la parma grupo en malnova distrikta urbodomo. Lerte gvidis ilin Francesco Maurelli kaj Sara Spanò, reprezentantoj de UEA kaj de Kosmo, la sperta firmao, kiu helpis en la verkado de la peto por financado fare de EU. Publika evento estis gastigata dimanĉon posttagmeze en la prestiĝa sidejo de la historia biblioteko de la benediktana monaĥejo Sankta Johano, kies pastro Gustavo Zanoli estas la prezidanto de la Parma Esperanto-Asocio „Giorgio Canuto”.



Bruĉjo Kasini parolas pri la projekto „30 Oraj Horoj”

Precipe kvar konkrete esplorindaj sugestoj por projektoj pri daŭripova transportado evidentiĝis dum la laboroj. Du estis proponitaj fare de Lars Sözüer, Ĝenerala Sekretario de BEMI. La unua temas pri monda mapado de ne plu uzataj fervojoj, kiuj estas jam konvertitaj al biciklovojoj aŭ povus tiel esti. La avantaĝo de tiu solvo, krom pli facile pretigi vojon por bicikloj, estus savi por la publiko terenon, kiu povus denove facile iĝi fervojo, se la estontaj cirkonstancoj tion permesos, helpante verdan konvertadon anstataŭ pliajn aŭtoŝosejojn. La dua projekto estas vasta kaj daŭre ĝisdatigata kolekto de informoj koncerne la ofte malsamajn internaciajn regulojn pri la kunportado

de biciklo dum trajnaj vojaĝoj. Tio multe helpos la planadon de verdaj vojaĝoj por biciklemuloj kaj la laboron de fervojistoj. La tria sugesto venis de Vito Tornillo, Ĝenerala Sekretario de IFEF, kiu per sia prelego diskonigis kelkajn jam ekzistantajn praktikojn uzi pli verdajn energifontojn sur trajnoj kaj en stacidomoj, kiel en la kazo de la fotovoltaa kupolo de la stacidomo de Torino Porta Susa, Italio. La inĝeniero Franco Bressanin de Parmo aldonis finan proponon kadre de sia ekologiema instruado al junuloj, montrante manierojn „verdigi" kaj beligi trajnojn kaj stacidomojn per facile prizorgeblaj plantoj, kiuj bezonus nur malmulte da akvo kaj zorgo (https://www.youtube.com/watch?v=9PLHS9-mJN0&t=40s).

La tuta projekto VERDEN estas interesa ankaŭ por ILEI, ĉar ĝi strebas akompanigi la ekologian pripensadon kun la daŭripova konscio de Esperanto en la lingva kampo. La internacia lingvo ne estas, do, nur ilo por kolekti informojn kaj propagandi rezultojn pri gravaj temoj de verda transportado mondskale. Ĝi estas ankaŭ grava objekto de instruado.



En Parmo Luigia Oberrauch instruis Esperanton al du komencantaj kaj entuziasmaj ĉeĥaj studentoj de la Universitato Pardubice. La Parma grupo prezentis la didaktikan animacion en Esperanto „La aventuroj de Saĝa Steleto". Kaj Bruĉjo Kasini, la prezidanto de la LKK de la ILEI-Kongreso de Massa en 2023, venis el Pisa (Pizo) speciale por prezenti la projekton „30

Oraj Horoj", frukton de kunlaboro inter ILEI, Itala Instituto de Esperanto kaj Esperanto-Grupo de Massa.

Temas pri instruado de Esperanto al volontulaj instruistoj de superaj mezlernejoj de la itala regiono Toskanio, kiuj poste instruos ĝin al siaj gestudentoj. La celo de tiu ĉi klopodo estas pretigi ilin pli profunde profiti el la granda interkultura ŝanco oferota de la mondaj kongresoj, kiuj okazos en Italio dum somero de 2023: la ILEI-kongreso en Massa kaj la UK en Torino. Bruĉjo detale priskribis la longan pretigadon de la projekto kaj la unuajn paŝojn de ĝia konkreta realigado, inkluzive de la scienca esplorado, sur kiu ĝi baziĝas.

Li ankaŭ rakontis kiel, kun Laura Brazzabeni kaj Enrico Borrello, li sukcesis persvadi la regionajn lernejajn aŭtoritatojn subteni la iniciaton.

Lia publika prelego spekteblas en la jutuba kanalo de ILEI (https://www.youtube.com/watch?v=eLzcJJfPB3U&t=74s) kaj certe ĝi povos oferi multe da sugestoj por tiuj, kiuj volus klopodi imiti aŭ adapti similan lernejan eksperimenton en siaj lokaj kondiĉoj.

Kiel atentigi pri Esperanto per origamio. Efekto de fiŝo-fiŝkaptanto.[1]

de Larysa OSADCHUK, gvidantino de ĉiudimanĉa virtuala ateliero pri origamio (Origamio kaj Esperanto. Ĉu eblas dialogo kaj kunlaboro? Vd. en eventaservo.org)



Mi pensas, ke unu el la gravaj taskoj de esperantistoj estas atentigi homojn pri Esperanto, kiel unu el la valoraj kaj utilaj bazaj scioj por la homaro.

Eble, estas pli facile fari tion en la origamia medio, ĉar origamio kaj Esperanto, laŭ siaj konstruoj kaj funkciadoj, tre similas unu al la alia. Ili estas karakterizitaj per simpleco de lernado, logiko, precizeco, simileco al konstrua ludo kaj la kapablo sufiĉe rapide

[1] Laŭ la prelego el VEKI-2.

atingi impresan rezulton. La praktikado de origamio kreas etoson de interkompreniĝo kaj fido, kaj alportas senton de ĝojo.

Ial oni povas supozi, ke homoj, kiuj okupiĝas pri ĉi tiuj du specoj de agado, havas similan pensmanieron. Origamiistoj povos senti la allogecon kaj utilecon de Esperanto pli rapide ol aliaj. Ĉar origamiistoj, plejparte, estas scivolemaj, societemaj homoj, malfermitaj al la mondo kaj kapablaj aprezi la unikecon de Esperanto kiel komunikilon, kiu ŝparas niajn tempon kaj energion. Al mi ŝajnas ke, se origamiistoj ekscius la unikajn eblojn de Esperanto, ili plezure uzus ĝin dum siaj internaciaj renkontiĝoj, anstataŭ la sufiĉe komplika angla. Do, Esperanto povus sukcese roli kiel labora lingvo por ili.



Sed ne nur por origamiistoj Esperanto povas esti utila.

Fakto estas, ke origamio, la tradicia japana arto faldi diversajn modelojn el papera kvadrato sen uzi gluon kaj tondilon, estas efektive iu teknika kreemo, kiu danke al sia specifeco, penetris en diversajn kampojn de scienco, teknologio, dezajnado kaj estas uzata ankaŭ en pedagogio kaj arto-terapio kiel efika nevorta komunikilo.

Kio interesas onin uzi origamion en scienco, teknologio kaj arto? Laŭ mi tio, kio permesas altiri la atenton de fakuloj kaj studentoj de diversaj fakoj al tia specifa trajto de origamio kiel eblo ŝanĝi la formon de objekto sen ŝanĝo de ĝia tuteco; grandigi kaj malgrandigi ĝin. Tio povos instigi matematikistojn, inĝenierojn, arkitektojn, dezajnistojn uzi en sia profesio ĉi tiujn fenomenajn ecojn.

Kio estas interesa pri la potencialo de origamio en la kampo de komunikado, inkluzive nevortan komunikadon? Fakte, origamiumado helpas krei kontakton en komunikado, tial la praktiko de origamio jam de pli ol 30 jaroj estas uzata de instruistoj, psikologoj, artoterapiistoj, lernejaj vigligistoj, sociaj laboristoj ktp. Origamio povas esti utila por krei amikecajn rilatojn en internaciaj grupoj kaj centroj, ĉar ĉi tiu agado rompas etnajn barojn kaj kreas etoson de fido inter homoj.

Ĉiuj praktikantoj de origamio estas kategorio de homoj, kiuj potenciale povus interesiĝi pri Esperanto kiel nuntempa fruktodona teknologio, kiel internacia lingvo por komunikado, kaj ankaŭ kiel fonto kaj kondukilo de universalaj homaj valoroj - la ideoj de paco, egaleco, interkompreniĝo kaj reciproka respekto, kaj starigo de amikaj ligoj inter reprezentantoj de diversaj kulturoj.

Ekzistas multaj vojoj por allogi la eksteran publikon al Esperanto inkluzive diversajn artagadojn. Ni proponas origamion kiel brilan atento-kaptan ilon, kiu povas alloge malkovrigi Esperanton por la tiel nomata „ekstera" publiko. Ĝuste kiel la fiŝkapta fiŝo, kiu loĝas en la malluma profundo de maro kaj kaptas predon per sia „fiŝkano" brilanta je la fino.

La origamiaj ekspozicioj ĉiam estas fascinaj, kaj la demonstrado de faldado agas kiel miraklo. Dum diversaj agadoj (ekspozicioj, rondaj tabloj kaj atelieroj, kursoj, kie origamio kaj Esperanto prezentiĝas kune), ni allogas pli grandan nombron da homoj, diversaĝaj kaj diversfakaj, ol se ni farus tion nur per Esperanto aparte.

Kaj nun – kiel tiu origamia „fiŝkano" funkcias?

Vizitantoj, kiuj spektadas origami-ekspozicion, estas fascinitaj per ĝi (ĉar origamio ne povas ne fascini), ili ekaŭdas multajn novajn faktojn pri origamio, ĉi tiu tradicia japana ludo kun papero faldita laŭ geometriaj linioj, pri tiu miriga tekniko, kiu fariĝas ege populara en la moderna mondo kaj daŭre malkaŝas siajn potencialojn.

Kaj en tiu momento, kiam la atento de la publiko estas kaptita, kiam

origamio, kiel altvalora kristalo, ludas kun ĉiuj siaj facetoj, ni proponas prispekti unu el ili pli detale. Temas pri uzo de origamio kiel rimedo por vigligi komunikadon, kiam dum la faldado la baroj de malfido kaj timo estas venkitaj, kiam komunikado kaj interkompreno inter gepatroj kaj infanoj, instruistoj kaj lernantoj, kuracistoj, psikologoj kaj iliaj pacientoj fariĝas facilaj kaj eblaj (kaj foje la solaj eblaj).

Ĉe la kulmino mem, kiam la fenomeno de origamio ĝenerale kaj ĝia rolo kiel komunikilo fariĝas por la spektantaro ne nur aŭdata fakto, sed instigo por agado, por uzo en sia vivo, en laboro, kiam la prezentitaj ludmetodoj de origamio, iliaj simpleco kaj influopovo fariĝas evidentaj kaj la spektantoj volas provi faldi ion mem, vi povas proponi al ili faldi kune la simplan modelon.

La unua pozitiva rezulto tre inspiras la spektantaron, ili ĝojas pri ĉi tiu miraklo, kiun ili mem kreis. Ili fariĝas pli malfermaj kaj societemaj kaj pretaj por spekti novajn miraklojn. Kaj ĉi tie, laŭ nia opinio, ni povas prezenti al ili alian miraklon - Esperanton, simplan lingvan konstruludon, speciale kreitan por internacia komunikado. Vi povas uzi origamiajn kubojn, kaj kun ilia helpo montri kiel, ludante kun la radikoj kaj finaĵoj, kiuj difinas apartan vortparton, krei substantivojn, adjektivojn kaj adverbojn, kaj tri verbajn tempojn. Kiel, kun la helpo de prefiksoj kaj sufiksoj, konstrui novajn vortojn. Kaj ĉio ĉi – nur en kelkaj minutoj. Poste vi povas inviti la spektantaron krei mem vortojn el la radiketoj, aldonante sufikso-kubojn kaj finaĵo-kubojn laŭ la simplaj reguloj de Esperanta solfeĝo. Estus interese ankaŭ montri mallongan filmeton pri nia Movado.

Kompreneble, la celo de tia demonstracio ne estas instrui la lingvon, sed nur konatigi la ĉefajn principojn de ĝia funkcio, malkovrante nur iomete la fenomenon de Esperanto. Gravas montri, ke ekzistas en la mondo tia magia ŝanco por interpopolaj agantoj komuniki en egalaj kondiĉoj, uzante simplan, logikan, bone kompreneblan sistemon, kiu ŝparas la tempon kaj nian mensan energion. Ke eblas ĝoje paroli preskaŭ spontane, sen ŝarĝi la memoron per nenecesaj vortoj kaj multaj, ofte ne tre logikaj, gramatikaj reguloj. Ankaŭ estus interese por la publiko malkovri la rolon de Esperanto en la individua disvolviĝo de la infano. Temas pri vigligo de imaga kaj logika pensado, komunikado, la kapabloj lerni fremdajn lingvojn, ensorbigi la grandajn moralajn valorojn kiujn alportas Esperanto, reciprokan respekton kaj humanismon. Lernado de la bazoj de Esperanto en lernejo donus al homoj efikan ilon por facila internacia komunikado, kompareblan laŭ graveco kun la multiplika tabelo en matematiko. Al mi ŝajnas, ke la propono uzi

Esperanton kune kun origamio en lernejoj kiel du efikaj iloj por ĉiuflanka disvolviĝo de infanoj helpus enkonduki Esperanton en la sistemon de edukado. Cetere, origamio iom post iom penetras lernejojn kaj estas uzata en matematikaj, belartaj, laboraj kaj lingvaj lecionoj.

Jen tie mallonge ni povas prezenti la uzon de origamio kiel logaĵon de fiŝhoko por allogi la atenton de la ekstera publiko al Esperanto. Sed en ĉi tiu afero gravas ne tro agi. La unua renkontiĝo kun Esperanto devas esti nerekta, impresa, malpeza kaj atentokapta, kiel flugo de papilio, por ke la homoj nur ekhavu la instigon serĉi novajn renkontiĝojn.

Nun kelkaj vortoj pri tio, kion ni praktike faris por atingi ĉi tiun celon. Dum la lastaj 8 jaroj ni faris multajn atelierojn, prelegojn, ekspoziciojn de origamio en Montpeliero por neesperantistoj kaj kadre de diversaj E-aj renkontiĝoj: dum la Itala E-a Kongreso en Kastelaro (2013) kaj Fraskati (2016); NI en Nordlingen (2014), Pluezeko (2014-2016), en Anvers en Belgio (2016), dum la Infana Semajno en Grezijono (2016-2019), UK kaj IIK en Lisbono (2018). Ekde 2020, pro la pandemio, ni komencis labori rete:

– Post UK 2018 en Lisbono kaj virtualaj Esperanto-renkontiĝoj en 2020 (SES, VK, VEKI), kun helpo de Rodrigo Tavares kaj Karlo Olivejra el Brazilo, estas kreita grupo de origamio en Esperanto „EsperOri” en Telegram, kiu kunigas nun 90 partoprenantojn el multaj landoj.

– Ekde aŭgusto de 2020, kun granda subteno de IrEA kaj Ahmad Mamduhi, ĉiudimanĉe vespere laŭ la horzono de Francio funkcias ateliero pri origamio per Zoom (jam 50 atelieroj okazis, informo pri ili estas trovebla en *eventaservo.org*). Ĉiu ateliero havas temon, pri kiu ni iom diskutas, ĉar origamio rilatas al multaj flankoj de la vivo: arto, filozofio, edukado, scienco ktp. La partoprenantoj ricevas diversajn interesajn dokumentojn pri la elektita temo (pri tio mi dankas pro la helpo de Alain Delmotte). Kaj poste ni faras kelkajn modelojn, rilate al tiu aŭ alia temo. De tempo al tempo ni havas specialan temon: Festo de la Fino de la Jaro, Festo de Geamantoj, Tago de la Tero k.s.. Mi dankas pro la entuziasmo de Karlo Olivejra, esperantisto kaj origamiisto el Brazilo, - aŭtoro de ĉiuj 50 afiŝoj por niaj Ori-atelieroj kaj disvastiganto de informo en la reto. Dum 12 monatoj, en la ateliero partoprenis pli ol 60 homoj, esperantistoj kaj ne-esperantistoj el pli ol 27 landoj el Eŭropo, Suda kaj Norda Ameriko, Afriko kaj Azio, kaj tio iĝis vere internacia agado. En nia ateliero partoprenis multe da origamiistoj el diversaj landoj, kiuj sciis nenion pri Eo, kaj havis eblon spekti kiel facile oni parolas tiun lingvon.

Pri distanco, sed ne pri viruso

de Mireille GROSJEAN (Svislando)

Unue ekzemploj, poste analizo

Mi instruis Esperanton en Benino, ne temis pri kurso por komencantoj, sed pri preparo al ILEI-ekzameno de meza nivelo. Do la studentoj jam bone uzis la lingvon. Venis ekzamena sesio en ĵaŭdo. Unu aliĝinto ne aperis. Do la sesio okazis sen li. Sabate li aperas, sin prezentas kaj diras, ke li volas fari la ekzamenon. Mi respondas, ke tio ne eblas, ĉar la sesio okazis ĵaŭde. Li klarigas, ke li havis staĝon dum la tuta semajno. Li aldonas: „Mi volas studi Esperanton kun vi, mi volas, ke ni estu kune po unu horon en ĉiu tago". Tiam mi respondis: „Mi ne povas eniri tian programon. Fakto estas, ke mi estas prezidanto de ILEI, mi laboras en 70 landoj kun niaj sekcioj kaj reprezentantoj. Vi trovos bonan esperantiston ĉi tie en Benino, kiu tute adekvate povos instrui al vi."



En la japanaj batalartoj estas niveloj de nigra zono, kies nomo estas „dan". Iu persono povas havi duan dan, trian dan, kvaran dan, la plej altnivelaj majstroj havas naŭan dan aŭ eĉ dekan dan. Antaŭ ol akiri nigran zonon, la unuan dan, kies nomo estas „shodan" (la nivelo de la komencanto…) estas diversaj niveloj, kies nomo estas „kyu". Do, tutkomencanto estas sen kyu, en la japana „mukyu". Sekvas sesa kyu, kvina kyu, kvara, tria, dua, unua kyu. En diversaj batalartoj kiel ĵudo kaj karateo la kyu estas videblaj per koloraj zonoj. Bruna zono estas unua kyu, tuj antaŭ la nigra zono. Post la unua kyu sekvas la unua dan, shodan, la nivelo, kiam la vera severa laboro komenciĝas... Kiam mi estis tria aŭ dua kyu en aikido, mi instruis al mukyu, al komencantoj. Mi instruis kiel saluti la praktikejon, la doĵon, kiel nodi la zonon, kiel fali kaj stariĝi post la rulado. La distanco estis 3 aŭ 4 niveloj. Tio estas bona distanco. Al shodan, dua dan, instruas persono kun sesa dan aŭ sepa dan. Denove oni vidas la adekvatan distancon.

Altnivelaj homoj, eble profesoroj, ne plu memoras siajn malfacilaĵojn de la tempo, kiam ili estis komencantoj. Pro tio la distanco ne devas esti tro

granda. Ankaŭ povas okazi, ke altniveluloj ne havos paciencon. La plej granda danĝero estas, ke eble ili sentos malrespekton, se oni donas al ili klason de komencantoj; ili havos la impreson, ke ili perdas sian tempon. Kelkaj ne plu revenos, ne plu akceptos inviton por tiaj kursoj. Ne invitu Katalin Kovats aŭ Ilona Koutny por instrui al komencantoj! Ili havas pli gravajn taskojn. Al pli lertaj gestudentoj ili povos doni la plenon de siaj scioj, kapabloj kaj spertoj.

Kapsulo

de Mireille GROSJEAN (Svislando)

Temas pri fermita ujo, skatoleto. Tiu vorto priskribas ekzemple la fermitan lokon de la artikoj. En la **sciencoj pri informado** kapsulo estas dokumento (teksto aŭ videofilmeto), kiu traktas precizan temon, kiu aperas kiel memstara, kun malmultaj ligoj kun iu kunteksto (kun iu libro, artikolo aŭ specifa kono) kaj kiu ebligas transdonon de informoj. Ĝi devas kongrui kun la principoj de Atomeco, Kohereco, Integreco kaj Daŭripovo (laŭ Vikipedio). Kapsulo aperas en vortaro.net kun 7 apartaj signifoj. Tamen la informcela kapsulo ne aperas inter tiuj sep. Diversaj prelegantoj preparis pri sia fako dudekminutajn filmetojn, kiujn ili nomas kapsuloj.

Kadre de la sesa Forumo por ILEI-gvidantoj (julio 2021) naskiĝis jena ideo: ILEI lanĉu kreadon de **mallongaj prezentaĵoj** pri iuj ajn temoj, laŭ la skemo de „TED-talks". Tiuj prezentaĵoj ne rajtas superi la daŭron de 18 minutoj. Mireille Grosjean proponas, ke ni enkonduku maksimuman daŭron de 16 minutoj, ĉar tiu nombro gravas en nia kulturo. Plie la mallonga formulo de 6 minuta parolado nomita „peĉakuĉo" kuru paralele. Kapsulo povus esti tria solvo. Iu esperantisto, kiu kapablas kaj fakulas pri iu temo, preparu iun tian prezentaĵon kaj ILEI kreu bibliotekon por montri tiujn filmetojn, ekzemple uzante sian youtube-kanalon.

Peĉakuĉoj
Peĉakuĉo - Vikipedio (wikipedia.org)
6 minutoj kaj 40 sekundoj. Maksimume 20 bildoj.

Maltedaj 16-minutaj defioj
Laŭ TED (prelegoj) - Vikipedio (wikipedia.org)


Nova eldono de lernolibro de Esperanto en la svahila

Bazo por lerni novan lingvon

de Mireille GROSJEAN (Svislando)

Kutimo estas, ke la bazo por lerni fremdan lingvon estas la denaska lingvo. Tio ne nepre devas okazi; vidu la artikolon de Peter Grbec el Slovenio, kiu akompanis siajn dekjarajn lernantojn tra la akiro de la angla kaj Esperanto samtempe. (*Vidu IPR 2015/4, p.23*)

Sed ni restu en la plej ofta situacio: la bazo estas la denaska lingvo, aŭ unu el la bonnivele praktikataj lingvoj de la studento. Tion scias klare la gvidantoj de Duolingo, kiuj lanĉis la kurson pri Eo en 2015 pere de la angla, poste de la hispana, poste de la portugala, kaj en 2020 pere de la franca lingvoj.



Jam en 1983 aperis lernolibro pri Esperanto en la svahila lingvo verkita de itala fakulo, Nino Vessella (*vd. maldekstre*). La titolo estas *jifunze lugha ya kiesperanto*. Sciendas, ke tiu afrika lingvo evoluis unue en la havenoj de orienta Afriko. Poste ĝi disvastiĝis en grandajn surfacojn de tiu parto de la kontinento, kun akiro de vortoj el la araba, angla, eĉ la persa kaj hinda. Tamen en la dudeka jarcento la lingvo stabiliĝis pro sia utiligado en amaskomunikiloj. Pro tiu miksita origino oni povas konsideri ĝin piĝino, kaj eĉ kreoltipa lingvo, ĉar ĝiaj denaskuloj jam ekzistas. Nun tiu lingvo estas uzata en Kenjo, Tanzanio, Komoroj, Ruando kaj Ugando; en tiuj landoj ĝi estas oficiala lingvo. Pro sia uzo en la orientaj provincoj de DR Kongo ĝi estas nacia lingvo en tiu ŝtato. En Burundo kaj Mozambiko ĝi estas agnoskita kiel minoritata lingvo. La Afrika Unio aldonis ĝin kiel oficialan lingvon apud la araba, angla, franca, portugala kaj hispana. Do ĝi estas la nura aŭtente afrika lingvo de tiu regiona organizaĵo. Laŭ vikipedio ĝi estas la denaska lingvo de 5 milionoj da personoj, kaj la dua lingvo de 150 milionoj da personoj. Por tiu grava afrika lingvo la ISO-kodo estas sw. Multaj esperantistoj konas minimume du vortojn de tiu lingvo: „Ĝambo Rafiki", *bonvenon amiko*, la titolon de verko de Tibor Sekelj.

Vi nun komprenas, kial nova eldono, la kvara, de la valora lernolibro de d-ro Nino Vessella tre gravas. ILEI esploris, helpis, puŝis, kaj finfine la verko

pretiĝis. La presado okazis en Burundo, en la ĉefurbo Buĵumburo, ĉar tiu urbo staras centre de la regiono, kie la lingvo estas uzata. 500 ekzempleroj aperis tie, kaj nia kolego Gilbert Ndihokubwayo zorgis pri dissendado de ties pakaĵoj al la najbaraj landoj. Du mecenatoj subtenis la projekton. Mi mem zorgis pri printado de eta stoko en Svislando por la bibliotekoj kaj por la libroservo de UEA.

Nun niaj tre aktivaj afrikaj kolegoj havos ĝin por pli efike lerni/instrui Esperanton per la svahila.

Esperanto kaj sociaj sciencoj (II.)

de Javier ALCALDE (Hispanio)



En la artikolo „Esperanto kaj sociaj sciencoj” (aperinta en IPR 20/1, p. 7-10), mi prezentis tri spertojn de uzado de la internacia lingvo en fakaj kursoj pri politika scienco kaj internaciaj rilatoj, kaj kiel ekzemplon de unu el la pritraktataj temoj, kaj kiel esplorobjekton. Ili estis elmontro de la vasta eblaro, kiun instruistoj el ĉiu fako havas je sia dispono por alproksimigi Esperanton al siaj studentoj. En tiu ĉi teksto mi daŭrigas la rakonton per tri novaj proponoj.

Ekde la pasinta semestro mi instruas universitate Mediteranean Politikon. Mi parolas pri la hodiaŭa situacio en tiuj teritorioj, sed ankaŭ pri ilia historio. Kiam mi mencias specifan landon aŭ konflikton, mi substrekas ĝian etno-lingvan dimension. Aldone, el kultura perspektivo (sed ne nur) parto de tiu historio ligiĝas al la „lingua franca”, kiu dum jarcentoj ebligis al la okcidentaj eŭropanoj kaj al la otomanoj komunikiĝi kun alilingvanoj en la mediteranea regiono. Mi dediĉis tutan lecionon al tiu temo. Unua malkovro: neniu el la studentoj aŭdis pri ĝi antaŭe. Multaj el ili devenas el Usono, sed inter ili ankaŭ estas egiptino, ukrainino kaj kroatino loĝanta en Svedio. Mi facile povintus enŝovi la ideon de nuntempaj lingvoj rolantaj kiel la mezepoka interlingvo, kaj tiel prezenti Esperanton. Ĉi-foje mi decidis ne tion fari, ĉar

pluraj el la studentoj ĉeestas alian kurson de mi instruata, en kiu oni jam parolas pri la zamenhofa lingvo.

Temas pri Politiko en la Evoluantaj Landoj. Enkonduke oni lernas pri difinoj kaj mezuriloj. Tiusence oni observas la rilatojn inter la tiel nomataj evoluantaj kaj evoluintaj landoj (ekzemple pere de migrantoj kaj rifuĝantoj); kaj la tutmondajn klopodojn por solvi tutmondajn defiojn, nome la (nunajn) Unuiĝintajn Naciojn kaj la (pasintan) Ligon de Nacioj. En ambaŭ okazoj mi ankaŭ klarigas la lingvan reĝimon de ĉiu institucio kaj ties historian kuntekston.

Poste, oni analizas diversajn modelojn de evoluigo, tiel ke el la studo de unu lando oni pripensu ĝeneralajn konkludojn aplikeblajn aliloke. Jen kelkaj ekzemploj: Kostariko utilas por pridiskuti kiom da mono registaroj devus elspezi por edukado, sansistemo, la armeo ktp; la transiro el diktaturo al demokratio en Hispanio interesas por debati pri paco kaj justeco en similaj situacioj, inkluzive de postmilitaj pacprocezoj; la ekonomiaj atingoj de Ĉinio defias la hipotezon pri tio, ke nur liberalaj demokratioj kapablas evolui; la kutima malbeno pri la naturaj rimedoj ne plenumiĝas en Norvegio, kiu malgraŭ siaj enormaj naftorezervoj estas eksterordinare stabila kaj krome pritraktas siajn monprofitojn el etika perspektivo. Parolante pri la disvolviĝo de Bangladeŝo - sukcesa lando el evolua perspektivo - mi mencias la gravecon de la bengala lingvo en la estiĝo de la lando. Indas kompreni, ke interalie per historiaj kialoj (ĉefe koloniado kaj malkoloniado) evoluantaj landoj kutime devas mastrumi grandan kulturan diversecon. Papuo-Nov-Gvineo estas la plej diversa lando en la mondo, kun pli ol 800 lingvoj, sed nur kvar el ili oficialas: la angla, la hirimotua, la tokpisina kaj la Papuo-Nov-Gvinea signolingvo; angla-bazita kreolo, la tokpisina rolas kiel landa lingvafrankao, dum la angla uzatas de la registaro, tribunaloj kaj la eduka sistemo. Aliflanke, Sud-Afriko agnoskas dek unu oficialajn lingvojn: la zuluan, la kosan, la afrikansan, la anglan, la pedan, la cvanan, la sotan, la congan, la svazian, la vendan kaj la sudan debelan. Tamen, dum la apartismo ĝi havis nur eŭropajn oficialajn lingvojn. Fakte en la lukto kontraŭ apartismo ĉefrolis la ribelo de Soweto, kiu nehazarde enhavis lingvan dimension. Ĝenerale lingva povo dependas de ekonomia/politika povo; tiel klarigeblas la ĉeesto en aliaj kontinentoj de la eŭropdevenaj lingvoj, sed ankaŭ la daŭra penado de multaj landoj por disvastigi siajn lingvojn.

Tiam alvenis la momento paroli pri Esperanto, kaj denove la studantaro ne sciis pri la afero. Tio ne nepre malbonas, ĉar tio signifas ke ili ne havas antaŭjuĝojn prie. Ili volis scii kiam kaj kial kreiĝis tiu nekonata lingvo. Mi

revenis al la Ligo de Nacioj, en kiu Esperanto ludetis interesan rolon; kaj mi aldonis informojn pri la persekutoj, kiujn suferis esperantistoj en la tridekaj kaj kvardekaj jaroj de la pasinta jarcento. La studentoj notis. Mi demandis ilin, kial diktatoroj el kontraŭaj ideologioj simile atakis la subtentantojn de la internacia lingvo. Kvazaŭ ili legintus la elstaran verkon de Lins, ili respondis: ĉar oni timis nekontroleblan internacian komunikadon de homo al homo. Dum la prelego mi menciis socilingvistikajn teoriojn pri lingva imperiismo kaj rilatajn konceptojn kiel lingvaj homaj rajtoj kaj lingva genocido, kaj ankaŭ prezentis la raporton Grin. Oni pasis al la praktika parto de la sesio, en kiu oni spektis filmon pri Sud-Afriko kaj grupe respondis kelkajn demandojn. La lasta jenas: „Ĉu laŭ vi neŭtrala helplingvo kiel Esperanto povus ludi ian rolon en multlingvaj komunumoj, ankaŭ internacie?" La studentoj nature menciis la avantaĝojn de Esperanto, sed ankaŭ montris sin skeptikaj pri la reagoj de la registaroj. „Estas tro da naciismo en la mondo", ili konkludis. Por homoj, kiuj neniam antaŭe pripensis tiajn aferojn, mi taksis la debaton sukcesa. La leciono finiĝis per spektado de jutuba filmeto, en kiu junaj denaskuloj parolas Esperante pri siaj spertoj.

La tria ekzemplo, kiun mi volis kundividi kun la legantoj de IPR, temas pri mikso de instruado kaj esplorado. En 2020 mi estis invitita al Parizo kiel gastprofesoro por doktoriĝaj studentoj ĉe EHESS (t.e. Altlernejo por sociaj sciencoj), kvankam la kronvirusa pandemio prokrastigis la aferon ĝis printempo 2021. Kadre de la tieaj seminarioj mi devis sugesti kvar prelegojn. Post iom da interkonsentado, ili ĉiuj estis akceptitaj. En seminario pri migrado mi parolis pri la esperantistoj, kiuj ekziliĝis pro la hispana milito kaj danke al la internacia Esperanta reto komencis novan vivon aliloke. En seminario pri la unua mondmilito, mi prelegis pri la Esperanto-movado en tiu epoko, inkluzive de ĝia rilato al pacifismo. En seminario pri la landoj de meza kaj orienta Eŭropo, mi montris la ampleksan disvastigon, kiun la internacia lingvo atingis en tiuj landoj dum la malvarma milito. En seminario pri la historio de socialismo mi analizis la intereson de la anarkiistoj pri Esperanto dum la frua epoko de la lingvo. Laŭ la kvanto kaj kvalito de la demandoj, iuj prelegoj estis pli sukcesaj ol aliaj, sed la sperto estis ĉiam pozitiva, kaj de ĝi venis neatenditaj sekvoj, pri kiuj eble mi rakontos estontece.

Resume, per la fendoj de la sistemo eblas inkludi Esperantajn elementojn en instruaj kaj esploraj kuntekstoj, pri kiuj oni ĝenerale ne konscias.

El la landoj kaj sekcioj…

Albanio

Antaŭ la jaro 2000 mi kompilis novan lernolibron de Esperanto por albanoj, kiun mi sukcesis propraelspeze eldoni en Tirana en la jaro 2005 je 1000 ekzempleroj. Sed nur kelkdekoj da ili vendiĝis je modera prezo de 4 eŭroj. Ĉirkaŭ ducent el ili mi disdonis senpage al la bibliotekoj kaj amikoj en Albanio kaj Kosovo. Restis sepcent je stoko. Mi decidis disdoni ilin senpage al ĉiuj elementaj lernejoj, gimnazioj, liceoj kaj fakultatoj en Tirano. Same al ministrejoj, akademioj, eĉ al polic-komisarejoj! Tiucele helpis min la fratino Iliriana, kiu senlace ĉiutage dum septembro kaj oktobro vizitis tiujn instituciojn, kie oni akceptis ŝin ĝentile, eĉ skribis dankleteron. Parteto de la stoko iris al Kosovo, Nordmakedonio kaj albana diasporo. Espereble tiu moviĝo naskos simpatiantojn kaj uzantojn por nia internacia lingvo.

Bardhyl SELIMI

Francio

PRINTEMPaS: intensivaj kursoj kun Przemek, Szabolcs, Christophe aŭ Marion. Eblo ekzameniĝi, de la 22-a ĝis la 30-a de aprilo 2022. Vidu rete: gresillon.org/p.

Germanio

Informado pri Esperanto al ĉiuj lernejestroj en Herzberg kaj en la regiono Göttingen

Gravan inviton ricevis la Esperanto-Centro en Herzberg de respondeculoj pri edukado en la granddistrikto Göttingen: prezenti Esperanton en konferencoj de lernejestroj, kiuj okazas unufoje en ĉiu jaro, kutime en novembro.

La invito ne venis tute neatendite, ja kelkajn monatojn antaŭe vizitis nin la ĉefo de la regiona administrado kaj faris priparolojn kun Peter Zilvar kaj Zsófia Kóródy, ĉefkunlaborantoj de la Esperanto-Centro. Li montris grandan intereson pri la neŭtrala lingvo Esperanto, pri ĝia interkultura rolo kaj pri la internacia uzado de la lingvo en multaj kampoj.

La prezentadoj en novembro okazis virtuale, per Zoom, por du grupoj: por ĉiuj lernejestroj de la t.n. mezlernejoj kaj gimnazioj kaj poste al la lernejestroj de profesiaj lernejoj. El la ĉ. 1-horaj kunsidoj ili disponigis al ni po ĉ. 10-15 minutojn.

Peter Zilvar prezentis la avantaĝojn de la neŭtrala kaj racia lingvo Esperanto kaj skizis eblojn por ĝia eventuala instruado dum po tri aŭ kvar instruhoroj semajne, simile kiel okazas la instruado de la itala, latina kaj hispana lingvoj.

Kompreneble tion devas antaŭi lingvoinstruado al instruistoj, kio povos okazi per intensaj ĉeestaj kursoj, seminarioj kaj ankaŭ per reta trejnado. Por dokumenti la mezureblajn lernpaŝojn ni povos proponi ekzamenojn laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER), resp. de Germana Esperanto-Instituto.
Aldone Zsófia Kóródy montris taŭgajn bildmaterialojn pri sukcesa Esperanto-instruado, projekt-tagoj kaj internaciaj partnerecaj kunlaboroj realigitaj kun lernejoj en Herzberg am Harz.
Ni dankas al la GEA-estraro pro la subteno, precipe al Ulrich Brandenburg, kiu lerte respondis kelkajn demandojn de sekciestrinoj de la distrikta administracio en Göttingen kaj de lernejestroj.
Ni esperas, ke ni povis veki la intereson de kelkaj eduk-respondeculoj, al kio povas sekvi pluaj paŝoj en la venontaj monatoj, jaroj, depende de la lernejaj semestroj kaj de la administracia organizado.

Zsófia KÓRÓDY

Italio

El *Gazetara Servo Komuniko 1* (la 3-an de novembro 2021)
De Massimo Acciai

„Ĉu vi vere kredis, ke ni parolos Esperanton?" – demandis Francesco De Gregori antaŭ jaroj, en unu el siaj kantoj. Milionoj da esperantistoj tra la mondo daŭre kredis je tio, kaj la revo de Ludoviko Lazaro Zamenhof per etaj paŝoj ekviglas ankaŭ en lernejoj per interesaj projektoj. La sukceso de tiuj iniciatoj montris, ke studi la internacian lingvon faciligas la lernadon ankaŭ de la itala kaj de fremdaj lingvoj.
Estas precizaj kaj ampleksaj studoj pri la temo, kolektitaj en verko, kiun Alessandra Madella, vicprezidantino de Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj (ILEI), estas nun finpreparanta por eldono. Kiel Madella sciigas al ni, surbaze de la datumoj kolektitaj en eksperimentoj italaj kaj internaciaj, Esperanto, krom esti studprepara por fremdaj lingvoj, estas tre facile lernebla, utilas por plikonigo de la gepatra lingvo kaj krome helpas la integriĝon de lernantoj kun disleksio.
Tiuj ĉi projektoj gajnis gravajn premiojn, kiel ekzemple de Eŭropa Unio la *Multlingva Akcelilo* (akcelilo de plurlingveco) elpensita en 2017 de Zlatko Tišljar, sukcese spertita en bazlernejoj kroataj, slovenaj kaj bulgaraj. Per la studo de Esperanto eblis akceli je 25-30% la lernadon de pliaj fremdaj lingvoj; la „*Akcelilo de plurlingvismo*" do ricevis la Eŭropunian Kvalit-Markon por lingvoj en 2021. En ĉi tiuj semajnoj komenciĝas en Toskanujo projekto bazita sur ĉi tiuj internaciaj spertoj, titolita „30 oraj horoj", ankaŭ

por plibonigi la rezultojn de niaj mezlernejoj en la testadoj de la nacia taksinstituto INVALSI, kiuj en 2021 ne estis aparte brilaj. Lernejoj estas petataj aligi kelkajn proprajn instruistojn, kiuj post rapida kurso tiucele verkita, rete aŭ ĉeeste, pretas transdoni al siaj lernantoj 30-horan Esperanto-kurson, sufiĉan por igi ilin atingi A2-nivelon de lingvoscio, tio estas komuniki en simplaj kaj kutimaj agadoj pri konataj kaj komunaj temoj.
„30 ore d'oro" (30 oraj horoj) estas prestiĝa projekto, kiun la LKK de la ILEI-kongreso prilaboras kune kun la Regiona Lerneja Oficejo, kaj kiu kulminos en la somero de 2023 per monda kongreso de ILEI okazonta en Marina di Massa. Oni devas nur atendi la evoluon de tiu ĉi nova iniciato: ni estas certaj, ke la unuaj profitantaj de ĝi estos la gestudentoj mem.

Ukrainio

Miaj instruspertoj

Mi instruas seninterrompe al pensiuloj. Ĉe mi lernas pensiuloj de 65- ĝis 85-jaraĝaj. Mi ne rifuzas uzi ĉiujn senpagajn okazojn. Ekzemple, en la antaŭkvarantena jaro mi ne rifuzis veturi al apudurbo, preni 400 senpagajn paperajn bildkartojn pri Ukrainio kaj senpage sendi ilin al 60 landoj. Ankaŭ miaj lernantoj iom sendis. Ukrainojn mi dum la kvaranteno instruas pertelefone, ĉar mi ne havas komputilon, mi iĝis en la lastaj jaroj en Ukrainio mizerulino kun pensio de malpli ol 2 eŭroj por tago.
Saĝtelefonon mi antaŭe ne havis, mi sukcesis aĉeti ĝin nur meze de la pasinta jaro. Baldaŭ mi komencis esti invitata paroligi kaj perfektigi grupojn de alilandaj pensiuloj. Mi kun ĝojo akceptis ĉiujn petojn pri helpo de alilandaj instruistoj (paroligo kaj perfektigo de iliaj lernantoj, instruado al la instruistoj). Tiuj lernantoj, kiuj tute ne povis antaŭe eĉ al unu demando respondi, nun kapablas konversacii, verki grandajn rakontojn, kiujn ili mem aperigas en interreton, eĉ aldonas fotojn tien, kaj eĉ faras filmetojn laŭ la temoj.
Mi volas diri, ke mi estas esperantistino dum pli ol 48 jaroj, sed mi neniam uzas dum instruado lernolibrojn aŭ porkursajn materialojn el interreto, ĉar mi tre ŝatas mem krei ĉiujn miajn lecionojn.
Miaj lecionoj estas ekskursaj: mi prenas mian telefonon kaj gvidas lecionojn el iu muzeo aŭ interesa ekspozicio, bela parko. Ekz., mi okazigis lecionojn (por ĉiu mia grupo, certe, aparte) en la speciala granda ekspozicio de la plej fama ukraina pentristino, kiu belege pentris florojn, Katerina Bilokur, okaze de la 120-a jaro post ŝia naskiĝo. Post tio mi aĉetis multajn paperajn bildkartojn kun ŝiaj bildoj kaj sendis la arojn de tiuj bildkartoj al ĉiu partoprenanto de la lecionoj. Iuj lernantoj skribis al mi, ke ili enkadrigis la

bildojn kaj pendigis ilin hejme por ĉiutage vidi ilin. Kelkaj miaj lernantoj jam mem okazigas por ni siajn ekskursojn pertelefone.
Mi montris al miaj lernantoj originalajn belajn skulptaĵojn en Kijivo, vintre florantan grandan ĝardenon de azaleoj kaj kamelioj, flavajn siringojn, kampon de 1 miliono da tulipoj, inter ili ankaŭ la tulipojn „Esperanto”, kaj multajn aliajn unikaĵojn de mia urbo Kievo.



Kijivanoj de la aĝo 64, 75, 85 kaj mi dum 1 el la 6-horaj enparkaj lecionoj

Kiam la vetero ne permesas al mi eliri el la hejmo, mi okazigas parolig-perfektigajn lecionojn pri la historio de Esperanto, pri mondaj kaj ukrainaj famuloj, pri vidindaĵoj de la mondo. Ankaŭ pri gaja matematiko. Mi instruas ankaŭ prezenti magiaĵojn-iluziojn kaj la lernantoj ĝojas ilin montri poste al siaj parencoj kaj amikoj. Ni tre ŝatas virtualajn urboludojn, kaj hejman teatron. Iam ni kantas aŭ aŭskultas belan muzikon, profesiajn kantistojn. Miaj lernantoj tre ŝatas ludojn, enigmojn kaj volonte post la lecionoj prezentas ilin al siaj parencoj kaj amikoj.
Miaj lernantoj jam partoprenas en internaciaj aranĝoj, iam eĉ ne nur aŭskultante sed kunprelegante.
Ĉi-jare estis kreitaj 2 paperaj dulingvaj libroj. La fotojn por la unua preparis polino, kaj por la dua – mi. Ankaŭ kelkaj miaj lernantoj kontribuis al la libroj per siaj rakontoj. Estis okazigitaj en Pollando kelkaj radielsendoj pri Esperanto.

Instruante al pensiuloj mi nepre penas, ke la lecionoj estu tre variaj, tre interesaj, elvoku bonajn sentojn, ĝojon, kontenton, entuziasmon aktive lerni Esperanton. Do la materialoj neniam estas ordinaraj. Ili poste estos prezentataj al aliaj lernantoj, kiuj ĝojas vidi ilin.
Mi estas petita longe daŭrigi tiun parolig-perfektigan virtualan laboron, eĉ kiam la kvaranteno finiĝos.
Pro tio, ke mi montras la plej unikajn kievajn vidindaĵojn kaj interese rakontas pri ili, miaj lernantoj esprimis la deziron viziti Kievon. Do tuj kiam ili povos alveturi, mi okazigos tri internaciajn aranĝojn en Kievo speciale por miaj lernantoj (ili eĉ preparos prelegojn por tiuj aranĝoj!).
La grupoj estos de 5 ĝis 20 personoj. Jam antaŭ jaro mi ĉion plene preparis (kiel ĉiam): mi trovis tre komfortan nemultekostan hotelon, la tuta programo certe estas kreita laŭ la mendoj de miaj venontaj lernantoj. Por ili la tutan laboron mi plenumos senpage, ili devos pagi nur por la vojaĝo, loĝado kaj manĝado. Ĉion alian, eĉ muzeojn, teatrojn, ili havos bonŝancon viziti senpage aŭ tre malmultekoste. Mi pretas organizi aranĝojn, ekskursojn en Kievo same laŭ individuaj mendoj ankaŭ por aliaj esperantistoj, kiuj petos min.
Dum la kvaranteno mi partoprenis en multaj virtualaj internaciajn aranĝoj, en kiuj mi estis petata rakontadi pri mia instrumaniero.
Do mi instruas seninterrompe kaj sen kvaranteno kaj dum kvaranteno. Mi opinias, ke se esperantisto kapablas instrui kaj volas aktivi, nenio povas malhelpi. Do mi instruas ĉiam, eĉ malgraŭ tio ke mi estas mizera, havas tre malbonan sanon, estas ege okupata kaj tute ne havas liberan tempon. Esperanto-laboro estas por mi granda feliĉo, des pli nun, dum la kvaranteno.

Svetlana POGORELAJA

Kvin temoj por 2022

EKO: ILEI ĉiam dekomence subtenis la serion de ‘Esperigaj Komunikoj’ (EKO). La projekto ĉiam ege subtenis la Ligon. Nun al UEA kaj ILEI ni aldonas la kunlaboron de niaj fervojistoj; la longe aktiva faka asocio IFEF aligas sin kun la EKO-komunikoj. Kiel ĝis nun, komunikoj de ILEI bonvenas por EKO, prefere verkata specife por ĝi.

AMO: La unua numero de EKO portis la planojn por la programo de Aktivula Maturigo (AMO) tra UK. Ni jam havas dek unu proponojn, el kiuj kvar certajn. Ni kore invitas al ILEI okazigi seminarion kadre de sia kongreso

en Kebekio. Restas ebloj por ILEI kontribui al pliaj seminarioj: ekzemple la seminario en marto pri kreskigo de la juna membraro tra niaj plej gravaj aziaj landoj, la seminario en Aŭstralio en junio pere de la nova Pacifika Landa Asocio, kaj la jarfina seminario en Senegalo kadre de la 8-a Afrika Kongreso.

Fondaĵo Canuto: Fine de 2021 la nombro de subtenatoj kreskis ĝis 545, kompare kun 482 en 2020. La laboro kompili listojn de induloj por 2022 delonge ekis. Tradicie, ni deklaris politikon aparte subteni junulojn kaj virinojn. Al tio ni nun aldonas instruistojn, ĉar ili povas krei novajn parolantojn de la lingvo, kiujn ni urĝe bezonas. Do, mi volonte akceptos de ILEI proponojn membrigi instruistojn, por ke ili havu aliron al la reta versio de la revuo *Esperanto.*

Landa Parad': Tiu projekto tra 2021 ricevis egan laboron, kun signifaj plibonigoj. La novigoj por 2022 estos pli modestaj, sed inkluzivos novan eron 'Faka Kavalkado', kiu arigas en unu loko kontaktinformojn por la sesio de fakaj asocioj aliĝintaj al UEA. Ni pioniris pri la nova servo por Azio en novembro 2021, kaj por 2022 ni kreos similan servon por la aliaj mondaj regionoj. Ni volas zorgi, ke ĉiu, kiu povus interesiĝi pri ILEI, sciu trovi kontakton en la propra lando.

Sekcioj de ILEI: Ni atendas informojn pri la reaktivigo de la sekcioj de ILEI en Norvegio kaj Finnlando, same pri la kontaktpersonoj en Britio, Haitio kaj Srilanko. Pri kelkaj pliaj landoj, ni havas malabundon da informoj pri aktiveco. Aliflanke, ni laŭdas la renovigon de la grava sekcio en Francio, kiu nun ricevas novan impeton.

Stefan MACGILL (Hungario)

Pri la 55-a ILEI-Kongreso en 2022

Vi trovas ĉiujn detalojn pri la aliĝo en la ttt-paĝaro 2022.kongreso.org.

Gobbo, Federico. Amikaro: Lernolibro de Esperanto. Eldonis: lulu.com (2019).[2]

Recenzo de Hans E. BECKLIN, estrarano de ESF kaj luterana pastro.

Malofte aperas novaj lerniloj en Esperanto, kiuj efektive spegulas la nunajn bezonojn de instruistoj en la unua nivelo. Granda parto de tio fontas el la pura vero, ke tiu unua nivelo ŝanĝiĝis draste dum la lastaj dek kvin jaroj. Almenaŭ en la anglalingva mondo, kie mi pasigas la plimulton de mia instrutempo kiel konstanta stabano de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK), preskaŭ neniu serĉas ĉeestan kurson aŭ eĉ libron kiel enkondukon al Esperanto. Same, kluboj apenaŭ proponas kursojn taŭgajn al novuloj kaj interesatoj; se ili iel ajn instruas normale, se ili kapablas kunveni regule kaj paroli en Esperanto la plimulton de la tempo, oni taksas tion sukceso. (Ĉu estis perfide rezigni pri instruado, historie kaj eĉ statute grava celo de la loka organismo? Verŝajne ne. Certe la kvalito de ĉeesta instruado variis tiom, kiom la lingva flueco kaj pedagogia lerteco de la amatoro instruanta la lingvon, nemalmulte konfuzante kaj mistifikante la neofitojn. Se ni devas gardi kaj ardigi la intereson de la novuloj, resurson konstantan sed fragilan kaj elĉerpeblan, ŝanĝi la celojn de loka grupo ŝajnas al mi tute saĝe.)

Anstataŭ lamenti pri la nuna stato de Esperanto, veante pro la iamo longe for kaj ĝiaj avantaĝoj rilate propagandon, ni konstatu, ke tute nova tereno etendiĝas antaŭ ni. Nuntempe, homoj normale entuziasmiĝas pri Esperanto proprainiciate pro sia interrete vastigita kompreno de la mondo. Tiu sama reto minutojn post la interesiĝo povas doti ilin per fundamenta (foje eĉ kela) scio de la lingvo. Normale, en la dua etapo de lernado ili rekte aŭ sinue atingas ian altkvalitan retan kurson kiel Lernu! aŭ Duolingo, eĉ se ili jam sorbis kelkajn klišojn per nacilingva fonto de varianta kvalito (kiel mi emfazis supre, amatora „scio" ne mankas al nia movado). Eĉ tiam, Esperanto tre ofte ŝajnas al ili eksperimento Sapir-Whorf-a, ludo edifa, eĉ ĉifro privata – resume io, kio diferencas de aliaj neparolataj, ekzotaj kaj artaj lingvoj nur je la fanfaronita facileco. Malkiel novulo foire varbita de karno, ostoj kaj flugfolioj, kies interesiĝo en si mem implicas apartenon al iaspeca societo aŭ

[2] La recenzo aperis en la blogo de Esperantic Studies Foundation kaj en la Beletra Almanako N-ro 42.

klubo ene de pli vasta komunumo, la novuloj de la nuno neniel devas supozi, ke Esperanto estas vivanta lingvo kun historio, normoj kaj iaspeca kulturo.

Tial, la nuna unua kurso devas diferenci de la antaŭa dumaniere. Unue, ĝi povas utiligi la lingvon multe pli aktive kaj produkteme, ĉar ĝiaj lernantoj jam komprenas la plimulton de la bazaj vortoj kaj ankaŭ bazajn gramatikajn konceptojn, eĉ se ili ne bone komprenas la superstrukturon de la gramatiko kaj ĝiajn pli subtilajn uzojn (ofte pro dependeco je unuvorta ekvivalento nacilingva). Ĉi tio en si mem iam antaŭe permesus eniron en babilrondojn kaj klubvesperojn, kie la komencinto provus palpi la ceteron de la lingvo ankoraŭ ne konatan, ofte ŝanceliĝante dumvive (aŭ ĝiskabeiĝe) pro tro frua debuto! Due, ĝi povas dependi de la relative forta lingvoscio sed de neniu scio, aŭ nur malmulta scio pri Zamenhof, la Fundamento de Esperanto, la Esperanto-movado kaj la E-a kulturo – aferoj montritaj kaj klarigitaj tre frue en la antaŭa sistemo de varbado kaj instruado enmovada. Konsekvence, lernilo de la unua ĉeesta nivelo devas transformiĝi: kaj de simpla kaj nacilingva al io bunta, internacia kaj prefere plene E-lingva, kaj de supozata Esperanto-fono al intenca celo klarigi pri E-o kaj ĝiaj nelingvaj facetoj.

Bonŝance, Federico Gobbo konscias pri kaj respondas al ĉi tiuj modernaj postuloj per sia lernolibro *Amikaro*, eĉ se kadre de sia propra universitata instruado en Eŭropo. Kvankam li prezentas ĝin kiel posteulon de la populara lernolibro *Kunvojaĝu* de Paul Gubbins, kies temaro laŭ Gobbo eksmodiĝis dum ĝi restis lingve freŝa, efektive *Amikaro* estas kaj pli altnivela ol tiu antaŭulo kaj multe pli marinita en la esenco de Esperantujo, spegulante la ŝanĝojn supre prezentitajn.

Ĉiu el la dek ĉapitroj prezentas dekonon de rakonto pri itala studento studanta en Amsterdamo, ekzercojn, gramatikajn klarigojn, legaĵojn kaj glosaron. Mi plene fidas, ke la tuto povus taŭgi por semestra kurso de inter 28 kaj 36 kontakthoroj, kvankam en intensa kurso kiel NASK aŭ SES oni verŝajne bezonus malpli da klarigoj pri la kulturo de E-o (kiu ne foras sed senteble penetras ĉion tiukuntekste), malpli da alkutimiĝo al la lingvo komence de la leciono (pro mergiĝo) kaj malpli da ekzamenoj kaj taksado (pro notmanko kaj celo alispeca). La kompostado, kiu prezentas klarigojn ofte marĝene, certe ebligas pli altnivelan tekston taŭgan por lernanto, kiu efektive jam trempis sin en Esperanto antaŭ ol aperi en la koncerna kurso. La intrigo en la rakonto pri la itala studento kaj liaj aventuroj kiel nova esperantisto en nova lando estas multe pli sukaj kaj modernaj ol la konataj tekstoj por komencantoj pli ofte rekomendataj. Nur la Katrina-libroj de Sten Johansson efektive povas konkuri kun ĉi tiu rakonto de Gobbo.

Sufiĉas scii, ke la intrigo konas nek pudoron nek la konturojn de raciaj esperoj rilate la EO-movadon. Roluloj enamiĝas, amare disiĝas, vortludas, agaciĝas pri maljunuloj en Esperantujo, estas pluramemaj, lesbaj kaj neduumaj, uzas „ri”, „-ip-”, „-pj-”, kaj j-riismon… kaj finfine trovas sin venkantaj EO-agitintoj, almenaŭ en fantazia Eŭropa Unio Esperantlingva. Ĉion Gobbo prezentas vivece kaj detale, eĉ la superoptimisman lastan ĉapitron, kvankam kelkaj el la detaloj aŭguras rapidan ranciĝon de la teksto – ekz., dum la pronomo „ri” daŭre kreskis kaj stabiliĝis, la j-riisma solvo al la defio pri seksbazitaj pruntovortoj perdis sian lokon eĉ en la lingvaĵo de sia iniciatinto (Kramer, „Seksneŭtralaj parencovortoj – rezultoj de opinisondo”, 2021). La moderna teĥnologio indulgas ĉi tiajn kapricojn multe pli ol la ekseraa, ĉar la lernolibron la aŭtoro mem eldonas kaj presigas laŭ mendo.

La avantaĝoj de tia sistemo – ĉiama aktualeco, se oni revizias sufiĉe ofte – tamen prezentas defion al recenzanto, kiu ne povas scii, kiuj eraroj ne plu ekzistos en la ekzemplero de nuna mendanto. Malgraŭ la rimarko fine de la enkonduko, ke „ĉi tiu ekzemplero profitas de la sperto de la unuaj legantoj, kaj ĝi estas sen multaj vipuroj, kiuj enŝoviĝis en la antaŭajn ekzemplerojn”, ankoraŭ siblas tiuj vipuroj fiere sur rokoj kaj nevideble inter densaj tigetoj de lolo. „Fugi” estu „fuĝi” kaj „fnaĵoj” estu „finaĵoj” (9); „akuzatiro” estu ne antaŭ juĝiston sed simpla „akuzativo” (22); „saketoenvesto” enhavu spacetojn aŭ retroiru sur papiruson (33); „elle” estu „ol” (51); „aktanto” rezignu pri la parlamento kaj simple agu (53); „kanotj” estu „kantoj” (54); „circonsatncan” estu „cirkonstancan” (66); „ĉi tinu” estu „ĉi tiun” (68) kaj „makilo” estu „markilo” (97).

Krom vipuroj, foje galimatio aŭ vera eraro enestas: „paralapepipeda”[3], afero nemalĉifrebla al mi (32), „bonbono” du fojojn, kaj ne por Platone ideali sed por frandiĝi kiel bombono (109) kaj la plurloka miskompreno, ke „ruli” estas netransitiva verbo, ekzemple en la frazo „apoj, kiuj rulas en la telefono mem” (33). En normala libro, ĉi tiuj eraroj simple iritus iomete, sed en lernolibro eventuale uzata de malpli sperta esperantisto (eble eĉ de profesoro entuziasma sed ne bonbona en sia kompreno de la internacia lingvo) ili povas vere miskonduki. Lerta, eble eĉ pagata, provleganto certe helpus al ĉi tiu lernolibro elstari plu; ni konsciu kiel movado pri la graveco de sentuberaj lernomaterialoj.

Kvankam mi alte taksas la rakonton, kiun oni spuras tra la libro, laŭ mi la plej elstara parto de *Amikaro* estas la mallongaj gramatikaj prezentoj. Ĉio

[3] NdlR: paralelepipeda (afero de sinkopo)

prezentiĝas koncize, sed ne tiel krokizite, ke spertulo aŭ eĉ fakulo en ili ne rekonus la nunan Esperanton. Kelkaj elementoj, laŭ mi, estas aparte bone prezentitaj: la Ido-devena sufikso IV (66), substantivaj participoj (80) kaj „valento", jam de jaroj uzata de mi por klarigi diversajn verbojn kaj la sufiksojn IG kaj IĜ (81, 95). Malgraŭ la indigno de multaj pri neŭtra pronomo, laŭ mi estis saĝe klarigi la proponon „ri" en la lasta ĉapitro – ĝi estas uzata multe pli ol la pronomo „ci", kiun Gobbo instruas pli frue, tamen taksante ĝin „rara" (67 – sed verŝajne ne laŭ la kutima signifo, kiu atribuas al raraĵo valoron pro malofteco). Se lernolibro baza en la nuntempo devas peri gravajn sciojn pri la nuna Esperantujo, ĝi nepre devas instrui ĉi tiun avangardan pronomon, ne vere amatan ĉevaleton sed ies dorlotatan ponEon, malamegatan de aliaj, kiuj volas el ĝi senkompate mueli hundan provianton. Samtempe iuj ne nur dorlotas, sed ankaŭ ekrajdas ĝin – precipe en la junularaj rondoj, kiujn Gobbo priskribas tra la libro.

Sed kiu ne pekis, kiu ne eraris? Ankaŭ en la gramatikaj klarigoj foje estas atencoj kontraŭ la kutima lingvo-uzado. „En la tempa uzo 'en' signifas tempodaŭron" (38 – eĉ se tiun signifon normale kovras „dum", dum „en" ĝenerale signifas tempopunkton, kompreneble kun iom da ambigua kunkirliĝo de la semantikaj kampoj pro tio, ke foje nur la perspektivo distingigas punkton disde daŭro). Same la ekzemplo „biciklisto estas homo, kiu vivas el biciklado, dum biciklanto estas iu, kiu foje biciklas" (108) tro ĥirurge sekcas la aferon, kiu en la realo estas malpli klara (ĝi temas ne pri vivrimedoj sed pri ofteco kaj kvazaŭprofesia graveco en la vivo); se estus ĉi tiel, nur Gobbo kaj kelkaj aliaj rajtus konservi la titolon Esperantisto, kaj multaj fervoraj aŭtistoj kaj biciklistoj devus ekenspezi por ne malpromociiĝi.

Ankaŭ la kabinetan proponon, ke kunmetaĵoj surbaze de la tabelvortoj je I (ekzemple „aliies" kaj „aliiel"– jes, tiele!) mi trovas ortografie, uze, prononce kaj sence kurioza, duoble en baza lernolibro (122). Sed plej freneza estas la ordono, ke „personaj nomoj ne prenu la akuzativan finaĵon" (11, emfazo en la originalo). Eble nomita denaske per nomoj perfekte finiĝantaj kvazaŭ substantivoj en E-o, Federico Gobbo klopodas persvadi homojn ne tordi lian nomon per aldona no, sed el prefero oni ne faru preskribon, precipe fronte al mala tendenco en la lingvo. Pro la enesto de ĉi tiuj devioj de la norma lingvo mi ne povas rekomendi la libron al lernantoj (afero malrekomendata de la antaŭparolo), malgraŭ la granda valoro de la rakonto kaj la gramatiko mezume. Mislerni ion estas pli damaĝe ol lerni ĝin malpli rapide sed finfine ĝuste.

La libro komence starigas la celon „komparo kun la fontolingvoj, nome, la lingvoj, kiuj inspiris Zamenhof por ĝisfunde kompreni kiel funkcias la E-a gramatiko” (iii). Legante tiun celon mi antaŭvidis novan aliron al instruado efektive diferencantan de la aliaj pri ĉi tiu punkto, kiu sendube interesus multajn novajn esperantistojn, precipe en la celata faka, universitata aŭ interlingvistika kunteksto. Bedaŭrinde, Gobbo ne bone teksas ĉi tiun fadenon kun la pli konataj (kaj de li pli mastrataj) pedagogiaj fadenoj. Nemalofte li prezentas etimon eraran (almenaŭ laŭ Vilborg), ekzemple dirante, ke AĈ venas el la jida, kvankam li devus scii tre bone kiel italo ĝian veran etimon, la italan (67). Ĝenerale la etim-mencioj estas akcesoraj, kiam ili aperas; ili ne helpas al la lernanto vidi la abundan materialon uzitan de Zamenhof nek la utilon de lia 15-a regulo.

Kelkaj uzantoj certe trovus la libron tro riĉa je maloftaj vortoj kaj esoteraj formoj (aperitivo, abandoni, semaforo, ladbotelo, obtenas, kirko, transseksa, repliki, gedormo, kosplejo, ĵedajo, selfio, nerdo, giko, frikulo). Ankaŭ la ofteco de poezio ĝenus multajn (se oni inkluzivigas kantotekston kiel poeziaĵon, ses el la dek ĉapitroj prezentas specimenan legaĵon poezian). En la epoko de PMEG, la dependado je vortoj kiel „antonomazie” kaj „adjekto” ŝajnus al multaj anakronisma pledo por la naturismaj terminoj de Plena Analiza Gramatiko. Sed mi ne plene aliĝas al ĉi tiuj kritikoj, leginte la tuton. Gobbo bone spicas sian lernolibron per strangaĵoj, kiuj vekas la lerno-apetiton pri la vera EO; ili estas ofte bone priskribataj marĝene per pli simplaj vortoj. La ideo, ke ni povas per fortika digo bari novajn lernantojn de la ĥaoso de la vivanta Esperanto de libroj kaj kantinoj kaj interretaj forumoj, kiuj ĉie enhavas neologismojn, strangajn formojn, artajn tekstojn kaj fakvortojn, nur garantias detruan inundon en la estonteco. Pli bone oni faru kiel lerta instruisto: lasu tiajn aferojn liki en la kurson, por ke lernantoj eknaĝu en vera lingvo profundiĝanta tiel rapide, kiel la elturniĝkapablo de la instruato.

Amikaro estas inda provo solvi la modernajn defiojn de la instruado de E-o. Gobbo foje manifestas siajn temperamenton kaj preferojn pli ol averaĝa verkanto de lernolibro, sed tio estas pardonebla. Pli grave, li bone komprenas, ke kreskigi estimon kaj al la lingvo EO kaj al ĝia kulturo paralele kreas harditajn e-istojn, kiuj povas ekuzi la lingvon en ĝia etoso plej ĝue kaj rapide. Senigite je siaj plej konsternaj eraroj, *Amikaro* povus akceptiĝi en multaj kursoj, inkluzive de la miaj, pro sia freŝa kaj moderna aliro. Ĝis tiam, ĝi restos lernolibro grava, sed tro idiosinkrazia por vasta uzado ekster la interlingvistikaj aŭloj de Amsterdamo.

INFORMOJ PRI ILEI

Laborkomisionoj

Ekzamena: Karine Arakelian (prez.), Mireille Grosjean (vicprez.), Mónika Molnár, Giridhar Rao, Jérémie Sabiyumva, Han Zuwu.
Elekta: Aurora Bute (gvid.), Zsófia Kóródy, Aristophio Alves Filho.
Kontrola: Simon Smits (*la dua membro elektota*)
Lerneja: Julian Hernández, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Marija Jerković, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.
Regulara: Marija Belošević, Rob Moerbeek, Stefan MacGill.
Terminara: Miroslav Malovec, Ilona Koutny, Mireille Grosjean.
Universitata: Duncan Charters (gvid.), Renato Corsetti, Gong Xiaofeng „Arko", Goro Kimura, Ilona Koutny, Katalin Kováts, Kristin Tytgat, Vicente Manzano-Arrondo, Radojica Petrović, Ivan Colling.

Enmovadaj partneroj (entute 14)

E@I (*Edukado ĉe Interreto*): Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, *info@ikso.net*. Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: http://www.ikso.net/eo/.
Fondaĵo edukado.net - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj. Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74, NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando. Retadreso: *redaktanto@edukado.net.*
ICH (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49) 55215983, Trejnsesioj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, *zsofia.korody@esperanto.de.*
IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio): *vd. la retpaĝon de UEA*
TEJO (http://www.tejo.org/): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Fernando Pita**. Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Albert Stalin Garrido.**
UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, *www.uea.org*. Observanto de ILEI ĉe UEA: **Ahmad Reza Mamduhi.** Observanto de UEA ĉe ILEI: **Duncan Charters.**
kaj aliaj

Ekstermovadaj partneroj (entute 8)

ALTE *(Asocio de lingvaj testistoj de Eŭropo)* Repr. de ILEI: **Zsófia Kóródy**.
FIPLV *(Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj)*
UN (kun statuso de observanto): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek, Ron Glossop, Leysester Miro.**
Unesko (kun statuso de observanto): Reprezentantoj de ILEI: **Alessandra Madella,** *a.madella@tiscali.it*, **Didier Janot,** *didier.janot@gmail.com*, **Emmanuel Desbrières** kaj **Maximiliano Garcia**.
kaj aliaj

Membreco kaj pagado por diversaj servoj

Membreco kostas 25 € en A-landoj (laŭ la malnova UEA-difino), **12,50 € en B-landoj kaj 2 € en C-landoj, kun ricevo de 4 numeroj de *IPR* jare. Kun aliro nur al la reta versio de *IPR* membreco kostas 12,50 € por la A-landoj, 6,25 € por la B-landoj kaj 1 € por C-landoj**. **Supera membro estas tiu ILEI-membro, kiu mendas paperan IPR kaj paperan *Juna Amiko* (JA). Tio kostas por A-landanoj 40 € kaj por B-landanoj 22,50 €.** Abono de JA papera kostas 18 € en A-lando, 13 € en B-lando. Abono de JA reta kostas 11 € en A-lando, 7 € en B-lando. Bonvenaj estas donacoj al la kaso de ILEI kaj al la fondaĵoj de ILEI. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por JA akceptas abonojn enlande. Por informi pri viaj pagoj, bonvole skribu al Karine ARAKELJAN, 33 Khandjian Str., Apt. 4, AM-0010 Erevan, Armenio, <*ilei.kasisto@ gmail.com*>. Bv klare indiki la celon de via pago. La pagoj por ILEI povas okazi a) pere de la nederlanda ILEI-banko aŭ b) pere de la ILEI-konto ĉe UEA. Jen detaloj:

a) Pagoj al la nederlanda banko de ILEI: numero 4676855 ĉe ING Bank N.V., IBAN NL55INGB 0004676855, BIC INGBNL2A. Bonvolu aldoni 5 € por la nederlandaj bankokostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo) kaj EU.

b) Pagoj al la konto de ILEI ĉe UEA: Por pagi al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, bv uzi: ING Bank, Postbus 1800. NL-1000 BV Amsterdam (konto: 37 89 64; IBAN: NL72INGB0000378964; BIC/SWIFT: INGBNL2A). Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj. Indiku vian nomon kaj vian landon, la celon de via pago kaj la konton de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Ĝiri monon el via UEA-konto al ILEI-konto ĉe UEA estas facila ago.

* Simpla abono de *IPR* sen membreco: 30 €. Reklamtarifoj por *IPR*: 180 € por plena, 110 € por duona, 70 € por kvarona paĝo. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

* ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag (NL) sub numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo (NL).

* Retpaĝo de ILEI: *http://www.ilei.info*.

REDAKCIAJ INFORMOJ

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Marc CUFFEZ, *Elisabethlaan 295, BE-8400 Oostende*. **Teknika helpo**: Stano MARČEK. **Presado**: Alfaprint, Martin, Slovakio. **Redaktoro**: NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario, jozefo.nemeth@gmail.com, www.ilei.info/ipr/;* tel*: (+36-70) 931-0530.*

Peranto de ILEI kadre de LIBE (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj): Olena Poshivana, *amatalena@ukr.net*.

Ni fermis la nunan numeron la 15-an de januaro 2022,
redaktofino por la sekva numero: la 15-an de aprilo 2022.

SEKCIOJ DE ILEI

Albanio: Bardhyl SELIMI, Rruga Fortuzi, nd.9, h.1, ap. 3, AL-1016 Tirana, *bselimi@gmail.com*

Armenio: Lida ELBAKJAN, Moldovakan 26/2, kv.52, AM-375062 Erevan, *Lidaelb@yahoo.com*

Aŭstralio / Nov-Zelando: Penelope VOS, Eastern Region Communications Rotary Australia World Community Services Ltd (RAWCS), *comms.eastern@rawcs.org.au*

Barato: Arikapalli Giridhar RAO, E 14 Good Earth Malhar Mosaic, Kambipura, Kengeri Hobli, Bengaluru 560060, India, *rao.giridhar@apu.edu.in*

Belgio: Marc CUFFEZ, Elisabethlaan 295, BE-8400 Oostende, *flandrio@hotmail.be*

Benino: ALOFA Jérome Charles, 04BP0672 BJ-Cotonou, Rep du Benin, *alofkarlo@yahoo.fr*

Brazilo: Aristophio Andrade ALVES FILHO, Rua B-55, N° 85, Conj. B. Bentes 1, Q. B-55, Benedito Bentes, Maceió, AL, Brasil, BR-57085-748, *esperantomaceio@yahoo.com.br*

Bulgario: Mariana GENCHEVA, Targovska 95, BG-5180 Polski Trambesh, *maries972@yahoo.com*

Burundo: Evariste BIGIRIMANA, BP 170, BI-Rumonge-Burundi, *bigevariste@gmail.com*

Ĉeĥio: Jana MELICHÁRKOVÁ, U Hřiště 398, CZ - 696 06 Vacenovice. *melicharkova@quick.cz*

Ĉinio: WEI Yiubin „Jado" Baiyangshujie Xiaoxue, Taiyuan Shanxi, CN-030003, *ilei_cxinio@163.com*

Danio: Pia WETTERGREN, Wettergren, Kastanjens Kvt 9 C, DK-2620 Albertslund, *frupiawettergren@gmail.com*

Francio: Didier JANOT, 3 rue Élisa Lemonnier, FR-75012 Paris, *didier.janot@gmail.com, https://eventaservo.org/o/ILEI-Francio*

Germanio: Zsófia KÓRÓDY, Esperanto-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz, *zsofia.korody@esperanto.de*

Hispanio: Luis Eduardo BERDOR REMON, Pablo Iglesias 41, 4 B, ES-50018 Zaragoza, *eduardo.berdor@gmail.com*

Hungario: József NÉMETH, Fő u. 41/5, HU-8531 Ihász, *jozefo.nemeth@gmail.com*

Irano: Ahmad Reza MAMDUHI, Nr. 9 K. Iraj, Kh. Dowlatshad Gharbi, Kh. Farid-Afshar, Kh. Vahid Dastgerdi, IR-19166-13514 Tehran, *mamduhi@gmail.com*

Italio: Luigia OBERRAUCH MADELLA, via Prampolini 8, IT-43122 Parma, *esperoenparmo2020@yahoo.com*

Japanio: ISIKAWA Tieko, Tate 1-6-6-103, JP-353-0006 Siki-si, Saitama-ken, *tiekosanjo_103@bj8.so-net.ne.jp*

Katalunio: Rubén FERNÁNDEZ ASENSIO. C/ Latrilla 12, 1r 2a, ES-08912 Badalona, *ileicat@hotmail.com*

Kongo DR: MAFUILA MAVOMO Jackson, C/O DKEA, BP 1007 Kin Limete Congo RDC, *mavomespero@gmail.com*

Korea Resp.: Soohyean PARK, 23, Seongsan-ro 4an-gil, Mapo-gu, Seoul, Republic of Korea, KR-03966, *elstara@saluton.net*

Kroatio/KEL: Marija JERKOVIĆ, Jarunska 6, HR-10000 Zagreb, *mjerkovic@net.hr*

Kroatio/KEU: Svijetlana AKIK, Franje Malnara 52, HR-10000 Zagreb, *ilei@hes-keu.hr*

Kubo: Magaly MOLINA SUÁREZ, Reyes 390 Apto.10 e/ Pocito y Luz, Lawton. 10 de Octubre, La Habana. Cuba *yunairamm@infomed.sld.cu*

Meksiko: Carlos HERNÁNDEZ LOARCA, Arco del Triunfo 2019-40 San Pedrito los Arcos, MX-76148 Querétaro México, *ilei@esperanto-mexico.org*

Mongolio: Khorloo TSERENDEJID, MN- Ulaanbaatar bayangol district, khoroo 24, 42-1-62, *tserendjd@yahoo.com*

Nederlando: Robert MOERBEEK, Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk, *moerbeekr@gmail.com*

Nepalo: Bharat Kumar GHIMIRE, Nepala Esperanto-Asocio, G.P.O. Box 10518, Kathmandu, *nespa_bharat@hotmail.com*

Pollando: Magdalena TATARA, ul. Grzegórzecka 74/4, PL-31-559 Kraków, *mtatara@gmail.com*

Rumanio: Mihai TRIFOI, Str. Principală, Bl.1 Ap.3, RO-527116 Bixad/Jud. Covasna, *mihaitrifoi@yahoo.com*

Senegalo: Assane FAYE, BP 1186 Rufisque, Senegal, *damanemanu2000@yahoo.fr*

Serbio: Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36, RS-32000 Ĉaĉak, *radojica.petrovic.rs@gmail.com*

Suda Afriko: Emile MALANDA NIANGA, PO BOX 2787 ZA-Cape Town, *emalandan@yahoo.fr*

Svedio: Sten SVENONIUS, Vendelsfridsgatan 4 c, SE 21764 MALMÖ, *ileise@outlook.com*

Svislando: Charles RODUIT, rue de Chancheri 1, CH-1661 Le Paquier, *charles.eo@roduit.info*

Tanzanio: Mulele Samwel MBASSA, Box 25, Bunda - Tanzanio. Poŝtel: +255786 819 767, +255758 176 722, *mulelembassa@gmail.com*

Togolando: ATTIOGBE-AGBEMADON B., Mensah, B.P. 39, Aneho, TG-Lomé, *abiovamensah@yahoo.fr*

Ukrainio: Nina DANYLYUK, pr. Sobornosti, 32, Log. 108 UA-43026 U. Lucjk, *nina_daniljuk@ukr.net*

Usono kaj Kanado: William B. HARRIS, 4 Edgecomb Ct, Portland ME 04013 USA, *wb_harris@hotmail.com*

Vjetnamio: Ngyuyen THI NEP, 70, B20A, Kim Lien, Dong Ha, VN-Hanoi, *Nguyennepa9cfl@gmail.com*

REPREZENTANTOJ

Britio: Elizabeth STANLEY, Frome House, Frome Gardens, Stroud, Glos. GL5 4LE, UK, *elistaros@hotmail.com*

Ĉilio: Héctor CAMPOS GREZ, Casilla 903, CL-3340000 Curico, *hecg@uea.org*

Ganao: Alfred Kobina ARTHUR, P.O. Box TS 404, Teshie, GH-Accra, *ctrcgh@gmail.com*

Islando: Loftur MELBERG Sigurjónsson, Traðarberg 13, IS-221 Hafnarfjörður, *lofturmsig@yahoo.de*

Israelo: Luiza CAROL, str. Bnei Binyamin 53, apt 12, Netanya IL-4201997, *luizacarol1947@gmail.com*

Niĝerlando: BOUKARI Ellias Illiassou, S/C de Kanguey BP11936 Niamey, Niger, *elliasdj@gmail.com*

Pakistano: Adeel Mahmood BUTT, Ward No. 11, near M.C. High School, PK-39100 Nankana Sahib, *adeelbutt84@gmail.com*

Rusio: Svetlana SMETANINA, 141850 d. Celeevo, Dmitrov-regiono, d.4A, kv.201 Moskovskaja oblast, *svsmetanina@yandex.ru*

Tajvano: Reza KHEIRKHAH, Chung Ching Road, No. 105, TW-Pingtung city, 900-73, *rezamenhof@yahoo.com*

Urugvajo: Sonia RISSO, Pascual Costa 3253 Apto 1215, UY-11700 Montevideo, *sonry@adinet.com.uy*

KONTAKTPERSONOJ

Argentino: Gabriel Enrique WAGNER, Misiones 1421, AR-3116 Crespo - Entre Rios, *gwagner@digitaloffice.com.ar*

Aŭstrio: Walter KLAG, Vieno, *esperanto@chello.at*

Bolivio: Leandra DIA RIOS, Calle María Estiváriz No 290, Avenida Coronel Valdez Pasaje Zaratustra, Villa Pabón, Zona Central, *mileis_7@hotmail.com*

Bosnio kaj Hercegovino: Nimeta KULENOVIĆ, Branica Sarajeva 15/V, BA-71000 Sarajevo

Finnlando: Sylvia HÄMÄLÄINEN, F.E. Sillanpään katu 2 C 46, FI-33230 Tampere, *sylvia.h@kolumbus.fi*

Haitio: Christine THEANO, Christ-Roi, Imp. Romane # 41, HT-6110 Port-au-Prince, *christinetheano@hotmail.com*

Indonezio: Ilia Sumilfia DEWI, Perumahaan, Pejuang, Pratama, Blok L, no. 11, RT/RW 003/006, ID-Bekasi, Jawa Barat, *ilia.dewi@gmail.com*

Kenjo: Gilbert S. SIKALA, Chemomi Estate, P.O. Box 22, 30301, Nandi Hills, *simiyugilbert@yahoo.com*

Kostariko: Hugo MORA Poltronieri, Apartado 4981, CR-1000 San José, *tikoguau@gmail.com*

Litovio: Gražina OPULSKIENĖ, Obuoliuko 42, Mažeikiai LT-89312, *grazopul@yahoo.com*

Luksemburgo: Claude NOURMONT, 2 om Kläppchen, LU-5682 Dalheim, *moonmont@pt.lu*

Nikaragvo: Uriel GURDIAN, Rpto. Shick 2da etapa, Iglesia adventista 1c O, 1c N. Casa G-32, Managua, Nicaragua, *esperantonica@gmail.com*

Norvegio: Douglas DRAPER Esperanto, Olaf Schous vei 18, NO-0572 *Oslo, oficejo@esperanto.no*

Portugalio: Luís LADEIRA, Rua Manuel Valadares, 10, 2E PT-2650-192 Amadora *luisladeir@gmail.com*

Slovenio: Peter GRBEC, Sv. Peter 142, SI-6333 Sv. Peter, *peter.grbec@gmail.com*

Srilanko: U.L.F.G.Zeiter PERERA.197, Indivitiya Road, Hettigama, Jaela, Srilanka, *zeiter.espero@gmail.com*

Taĝikio: Firdaus SHUKUROV, Glavpochtamt, a.k. 135 TJ-734000 Dushanbe, *komintel@yandex.ru; aet2005@ yandex.ru*

Turkio: Vasil KADIFELI, Ataturk mah. Turgut Ozal blv. Gardenya 2-1 D:21 Atasehir 34758 Istanbul/Turkey, *vasilkadifeli@gmail.com*

Venezuelo: Asociación Venezolana de E-o, Jezer DORANTE, Apartado postal 47675, Caracas 1041-A, VE, *jezerdorante@gmail.com*

Alvoko al niaj movadanoj!

Ni bezonas multajn novajn lernantojn.

Ili bezonas bonkvalitajn kaj konvenajn legaĵojn!

Ne necesas krei solvon – sufiĉas malkovri kaj subteni la solvon, kiu **ekzistas jam de 50 jaroj**, sed apenaŭ ricevas la subtenon, kiun ĝi meritas!



juna amiko

Revuo kun varia, aktuala temaro

Bunte ilustrita, **profesie** pretigata

Tre **internacia** redakcia teamo

Rigora lingva kontrolo

ELDONAĴO DE

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

Aperas 4-foje jare, perpoŝte aŭ rete liverata.

Tarifoj por la kalendara jaro 2022 en eŭroj

Papera 18/13* **Reta** 11/7*

Perantoj en **35 landoj** akceptas viajn abonojn.

*A/B-landoj

ilei

Pliaj informoj **www.ilei.info/revuoj**

Arkivo **www.eventoj.hu/juna-amiko**

Abonebla **https://bit.ly/abonebla**